

1989 decembro

82-a jaro

n-ro 1008 (12)

(aperas monate escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Kiel fenikse reaperis la vivoverko de Juan Régulo

Vi trovos,

pli profunde en ĉi tiu numero, specialan atenton al niaj sciencistoj. La temo ŝajnas taŭga por la lasta numero de la okdekaj jaroj: Ĝuste la sciencistoj, pli ol iu ajn alia movada fako, ĉerpis novan forton el la politikaj, teknikaj kaj sociaj ŝanĝoj de tiu periodo. Jen kelkaj spuroj. Ĉina sciencisto Ŝen Ĉenĵu skizas la reciprokan signifon de Esperanto kaj scienco-tekniko por sia lando, kiu en kvin jaroj faris pli da paŝoj sur tiu tereno ol la eŭropaj landoj faris en okdeko. Interlingvistoj Sergej Kuznecov, Detlev Blanke kaj aliaj prilumas la subitan "respektindiĝon" de sia fako kadre de la monda lingvoscienco. Kaj, por substreki ke la vojo ankoraŭ ne facilas, terminologo Michael Behr donas sobriĝan analizon de la praktikaj obstakloj al scienca okupiĝo en Esperanto. Evidente, dornoj kaj arbustoj plu flankas la padon. Sed jam, apude kaj antaŭe, kreskas fruktopromesaj burĝonoj, atendantaj la zorgan manon de talentaj kulturistoj.

Enhavo

- 201 Eldonado: Por denove stafeti scion tra la movada mondo (S. Milojević)
203 Servoj de UEA: Venigi la mondon al via pordo
Kulturo: Eldoni, prezenti, legi...
204 Intervjuo kun Sergej Kuznecov: Interlingvistiko iĝas grava en la moderna lingvoscienco
Internacia Alfabetiga Jaro 1990: Skribi por libereco
206 Scienca aplikado: Kvin jaroj da penado jam portas konkretajn rezultojn (Shen Chenru)
208 Terminologio: Ĉu fake okupiĝi, ĉu vivteni la movadon? (Michael Behr); Alvoko (W. Blanke)
210 Diskuttemo: Demokratiigo kaj Esperanto ("Kruco")
211 Recenzoj: *Lingvo kaj vivo* de Gaston Waringhien (Sergej Kuznecov); *Bibliografio de universitataj kaj altlernejaj diplomverkoj, disertacioj kaj tezoj pri Esperanto kaj interlingvistiko* de Edward Symoens (Detlev Blanke); *Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages*, red. Klaus Schubert (Jan Sosniecki); *Kiel Esperanto venkis? kaj Konfliktoj inter esperantistoj*, red. Ludovikito (G. Waringhien); *La laborista Esperanto-movado en Hungario, 1913-1934* de Zoltán Barna (Miyamoto Masao); *Akademias Studoj 1987*, red. R. Eichholz (Claus J. Güntel); *Sur la vojoj de la Analiza Skolo: Esperantologia eseero* de Rikardo Ŝulco (Valentin Melnikov); *Esperanta rinvortaro* de Jonathan Cooley (Kiril Velkov)
215 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
216 Reagoj: Freŝa vento (Angelos Tsirimokos); Survoje al dek mil... (Rob Keetlaer); Pli bone iam ol neniam (Ionel Onet)
Loke – Fake (mallongaj novaĵoj)
218 Esperantlingvaj radio-elsendoj dum la jaro 1989
Oficiala informilo
219 Indekso 1989

La kovrilo

La sav-operacio de UEA ĉe Stafeto, pri kiu vi povas legi apudapaĝe, estus eĉ pli modela se ĝi okazus dek jarojn pli frue... Feliĉe libroj eltenas pli longe ol homoj, se temas pri subakviĝo. Dank' al la ĵetita savzono nun reflosas iuj el niaj plejlegindaĵoj. Ĉu vi ne volonte tirus kelkajn en la propran boaton? Ĉu ne ankaŭ fiŝkapti iujn revuojn de sur p. 203? Ĉiuokaze, la stabo de UEA deziras al vi aktivan kaj prosperan veladon kun ni en la nova jardeko!

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US\$ 23; GM 39; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakvirlaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: +3110 436 17 51.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (01) 542 0302; telefakso (01) 380 7408.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 12999, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. (02) 646 5413; telefakso (02) 275 0633.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47; telefakso (1) 43 66 09 92.

Por denove stafeti scion tra la movada mondo

Kiam li antaŭ kelkaj jaroj invitis ankaŭ min kontribui al *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo*, mi estis konfuzita. Kial al mi tia invito? Sen esperantologiaj aŭ beletraj pretendoj, mi pasigis iom da jardekoj redaktante tekstojn, jen beletrajn, jen esperantologiajn, kaj tio estis pli-malpli ĉio. Aliflanke, ĝuste li, prof. Juan Régulo-Pérez, liaj libroj, siatempe katenis ne nur min al la movado. Mi tial komencis arde deziri verki la petitan kontribuaĵon, elektis temon, ekesploretis pri ĝi, sed... Venkis la organizaj koŝmaroj ĉirkaŭ la pekina kaj poste varsovia kongresoj. Mia kontribuaĵo, kiu volis kompari la eldonan politikon de Literatura Mondo kaj de Juan Régulo, neniam kunmetiĝis. Kiam la impona *Serta* aperis, mi malfeliĉis, ĉar sur ĝiaj 800 paĝoj neniu el preskaŭ 60 aŭtoroj traktis mian temon. Ni do ankoraŭ ŝuldas tiun komparon, ŝuldas ĝin ne malpli al ni ĉiuj ol al Régulo mem.

Tio ĉi ne estas tiu neverkita teksto. Movadisto neniam

sukcesos verki ĝin inter la ĉiutagaj menuoj de neatenditaj telefonvokoj kaj vizitoj, urĝaj leteroj, demandoj, fakturoj, mendoj, konsiloj petataj aŭ donataj. Estu tio ĉi incito al iu alia verki pri tiu temo. Se helpas kelkaj pensoj aŭ demandoj, jen ili:


Literatura Mondo en Budapeŝto inter la du mondmilitoj estis teamo. Jes, tie estis la kolona kaj kolosa Kolomano. Sed estis ankaŭ Baghy, Szilágyi, Totsche kaj antaŭ ĉio Bleier. Régulo solecis tie en Kanariaj Insuloj, sen kiu ajn eĉ por neformala kafrinka konsulto. Literatura Mondo produktis 78, Régulo 93 volumojn. Konsternas la internacieco de la aŭtoraro de Régulo: ĉio de Islando ĝis Argentino, de Madrido ĝis Tokio. Kuraĝo de Régulo imponas: li faris la tuton de sia giganta laboro sub la premo de la frankista diktaturo en Hispanio, spite la malvarman militon, kiu frostigis la rilatojn kun Orienta Eŭropo, de kie venis pluraj liaj volumoj.

Mi foje meditas jene: Se la kvaropo de *Kvaropo* ne estus trovinta eldoniston en 1952, ĉu Auld entute ekzistus en nia kulturo? Ĉu la eldono de *Kvaropo* ne estis sprono al *La infana raso*? Ĉu pri tio pensis ankaŭ Auld en 1985, kiam li en Aŭgsburgo vekiĝis frumatene por ame akompani sian eldoniston al la stacidomo kaj helpi, ke 70 jaroj de Régulo trovu sian trajnon kaj eniru ĝin? Se *Kontralte*

ne estus trovinta eldoniston en 1955, mankus eble al ni la postaj libroj de Boulton. Kio pri Rossetti? Mattos? De Kock? Ragnarsson? Francis? Conterno? Urbanová? Ribillard? Thorsen? Miyamoto? Waringhien ne estus sen Régulo tio kio li estas, ĉar oni ne verkas kvin ampleksajn esearojn, dum la unua serĉas eldonejon. Eĉ se ĉi tiuj demandoj sonas troige kaj simplisme, ili ja estas demandoj starigindaj.

Se ni rigardas, kiu nun estas kiu en la Esperanta beletro, kaj konstatas, kiujn el tiuj nomoj Régulo kuraĝis lanĉi, ni venas al konkludoj, kiuj igas nin profunde riverenci antaŭ liaj kuraĝo kaj klarvido. Krome, multaj el la Stafetolibroj jen tute pioniras sur novaj kampoj, jen mejloŝtonas sur sia tereno: *Esperanta antologio*, *Lingvo kaj vivo*, *Proverbaro*, *33 rakontoj*, *Kiel akvo de l'rivero*, *Vitraro*, *Zamenhof*, *Vivo kaj opinioj...*, *Maŝinmondo*, *La vivo de la plantoj*, *Planlingvaj problemoj*, ktp.

Serta estas digna omaĝo al Régulo. Ĝia dua volumo estas la plej monumenta esperantologia kolekto iam aperinta. Benczik tie taŭge verdiktas: "La Esperanta literaturo ŝuldas sian ekziston al tri eldonejoj: antaŭ la unua mondmilito al Hachette, en la intermilita periodo al Literatura Mondo, kaj post la dua mondmilito – al Juan Régulo Pérez." (*Serta*



II, p.64). Waringhien aprezas specife: "...la alta kvalito de liaj libroj – kvalito de la tekstoj, sed ankaŭ kvalito de la aspekto: bona papero, arkitekture harmonia tipografio, artisma prezentado... unuvorte ĉio, kio faras el la Stafetolibroj bibliografian trezoron." (*Serta* II, p.768). Edwin de Kock resumas en *Serta* (p.303): "...la kapitalo de J. Régulo konsistis ĉefe el klero multifaceta, amo al Esperanto kaj farkapablo, lerta kaj energia."

La eldonista vervo de Régulo floris kaj fruktis ĝis la fruaj sepdekaj jaroj. Ĝis tiam regule venis novaj titoloj. Ankaŭ la mendoj de librovendistoj plenumiĝis akurate. Tiam subite haltis ĉio. Aliaj provis klarigi tiun halton per la sociaj ŝanĝoj en Kanarioj, kien tiutempe direktiĝis turistaj homamasoj kaj la loka laborforto submetiĝis al tiu invado. Mi volas aldoni alian eventualan kialon: la movadaj problemoj en Hamburgo 1974. Mi renkontis Régulon tie. Mi notis kun kia korŝiro li spertis la eventojn tie. Ankaŭ nun, 15 jarojn poste, mi ne konas alian movadan personecon, kiu sentis sin tiel krucumita inter la du partioj. Li bezonis tutan jardekon por resaniĝi de tiu ŝoko. Tion bele ilustris lia elekto kiel Honora Membro de UEA en 1984: kiam Régulo iris al la mikrofono tie en Vankuvero, por diri kelkajn dankajn vortojn, li ekploris – simple kaj tiel home.

Intertempe, ĉiam fariĝis pli klare, ke Régulo mem neniam plu retrovos fortojn: ne nur por daŭrigi la agadon de sia eldonejo, sed ankaŭ ne por simple savi la jam faritan laboron, por inventari la pretajn volumojn, por gvidi la finfaron kaj bindigon de la aliaj. Ni komencis trakti la eblecon, ke UEA transprenu la tuton. Ni provis trovi helpon de lokaj esperantistoj, sed ankaŭ tio ne funkciis. Neniam vidinte la staton de la materialo en Kanarioj, mi ne sciis detale pri la amplekso de la laboro, kiu tie atendis. Bonŝanco volis, ke fine de 1987 al Kanarioj translokiĝis malnova amiko de Régulo kaj mi, por serĉi laboron tie. Ni decidis eluzi tiun subitan vakuon en la inĝeniera kariero de la amiko. Fine de januaro 1988 mi jen troviĝis en La Laguna kun firma decido fintrakti la transprenon de ĉiuj Stafeto-libroj fare de UEA.

La materialo okupis la tutan vastan teretaĝon de la granda domo de Régulo. Temis pri areo de eble 150 kvadrataj metroj. Ĉie tra tiu vasta staplejo kuŝis stakoj da konataj Stafeto-titoloj: montoj da presfolioj, skatoloj kun pretaj librokovriloj, libroj jam kunkudritaj, aliaj nur falditaj... Rimarkeblis, ke la laboroj haltis tie antaŭ dudeko da jaroj. Régulo promenis tie kun espero pri helpo savi lian vivoverkon.

Ni faris tian decidon en la unuaj tagoj de februaro 1988. Nur tie surloke mi komprenis la tutan grandiozecon de la laboro, kiun Régulo faris por Esperanto. Ni entreprenis ordigon, pakadon kaj konteneran sendon al Roterdamo de entute 25 kubaj metroj da libro-materialo. Nek Régulo nek mi sciiis ankoraŭ pri kiom da libroj kaj pri kiom da mono temas. Tamen, ni faris interkonsenton. Ankaŭ la Estraro de UEA ne sciis pri kia monsumo temas, kiam ĝi principe aprobis la interkonsenton. Montriĝis, ke ambaŭflanke la mono feliĉe ne ĉefrolis. Komuna estis la emo savi



Ne nur la esperantistoj admiras la vivoverkon de Régulo. En 1984 placo en La Laguna ricevis lian nomon, honore al multjardeka kontribuo al la hispana, kanaria kaj Esperanta kulturoj.

la grandan laboron de Régulo kaj disponigi al la novaj movadaj generacioj la Stafeto-librojn post ilia preskaŭ 20-jara foresto el la merkato.

Kiam ni nun saldas la kontojn pri la libroj de Régulo, ni konstatas, ke UEA investis en tiun transprenon entute 234 000 guldenojn. Niaj presisto kaj bindisto konsumis 120 000 el tio, la transporto kostis pli ol 10 000, tiel ke al la eldonisto restis iom malpli ol 100 000 guldenoj. Se tio devus esti salajro por 20-jara laboro de Régulo, por ĉiuj salajroj de li mem elpagitaj, por ĉiuj materialoj kaj maŝinoj, — vi konstatas, ke la eldonistoj ne riĉiĝas. Ankaŭ UEA ne riĉiĝis mone per tiu granda aĉeto. Aliflanke, se ni estus provintaj reeldoni ĉiujn tiujn dekojn kaj dekojn da titoloj, ni ne kuraĝus alfronti la problemon. Notu, ke nure la reeldono de *Lingvo kaj vivo*, kio ne estas en la supraj kalkuloj, kostis al UEA investon de pli ol 30 000 guldenoj. Tamen, tiu feniksa reaperero de pli ol 70 titoloj el la Stafeto-libroj reriĉigis nian komunan kulturon. Régulo riĉiĝis per malperdo de sia jardekojn longa laboro. Nun 33 000 ekzempleroj de tiuj reaperintaj Stafeto-titoloj proponas sin en nia libromerkato.

Baldaŭ post la alveno de la Stafeto-libroj al Roterdamo, post la ĉeesto en la kongresa relanĉo de kelkaj el ili, Régulo grave malsaniĝis en aŭgusto 1988. Dum monatoj li ne kapablis eĉ legi, nek paroli, nek korespondi. Nun lia sanstato iom pliboniĝis kaj komencas veni poŝtkartoj kaj leteretoj de li. Mi kontentas, ke ni preskaŭ lastmomente sukcesis solvi la plej grandan angoron de la granda eldonisto. Ankaŭ Régulo nun povas trankvili kaj kontenti, ĉar liaj libroj denove stafetas scion, bonan guston kaj kulturon tra la movada mondo.

Simo Milojević

SERVOJ DE UEA

Lige kun la membrokampanjo, ni iom regule tra la venontaj monatoj prezentos la diversajn agadojn kaj servojn de la Asocio. Multaj meritas esti pli vaste konataj. Ĉu vi, ekzemple, iam profitis vian membrecon por...

Venigi la mondon al via pordo

Pli ol 50 revuoj estas aboneblaj pere de UEA laŭ interkonsento kun la eldonantoj. La listo estas varia, kaj inkluzivas la ĉefajn landajn, fakajn kaj internaciajn revuojn. Pluraj membroj jam profitas la servon por regule aboni, utiligante sian konton ĉe UEA. Eblas ankaŭ mendi konstantan abonon tiel ke ni aŭtomate pritraktu ĝin ĉiun jaron. Vi povas ankaŭ mendi abonon donace al alia adreso.

En la CO la abonoj estas nun komputile farataj. Ĉu necesas aldoni, ke la jarkomenco estas aparte oportuna momento por pensi tiudirekte? Ni volonte vidus pli vastan uzon de la servo, por ke la revuoj mem ricevu pli da legantoj pli vaste tra la mondo.

		ns	
Revuo	Jarabono (gld.)		
Ateismo	16,00	Espero katolika	33,00
Biblioteka bulteno	18,00	Espero el Koreujo, La	24,00
Boletín (hispana)	27,00	Espero, La (sveda)	33,00
Brita esperantisto	21,00	Etnismo	18,00
Budapeŝta informilo	30,00	Fenomeno (nederlanda)	35,00
Bulgara esperantisto	32,00	Fokuso	24,00
Dia regno	21,00	Fonto	30,00
Ekonomia bulteno pri Usono	28,00	Franca esperantisto	50,00
Ekumenismo	22,00	Heroldo de Esperanto	43,00
El popola Ĉinio 1 jaro	35,00	aera ald.: Eŭropo	6,60
2 jaroj	59,00	Mediterraneo	8,90
3 jaroj	83,00	Afriko	15,50
Esperantist, Der	10,50	Ameriko, Azio	20,00
Esperantista vegetarano	12,00	Oceanio	29,00
Esperantisto slovaka	18,00	Hungara vivo	24,00
Esperanto, L' (itala)	23,00	ICEM (Freinet-instruistoj)	27,00
		Internacia pedagogia revuo	15,00
		Internacia revuo pri ekonomio kaj komerco	25,00
		Jaro 1990, La (Supl. Monato)	7,50
		aera aldono	2,00
		Juna Amiko	8,40
		Kancerkliniko, La	32,00
		Koko	20,00
		Koncize (individuaj abonoj)	12,00
		Kulturaj kajeroj	24,00
		Kvakera esperantisto	15,00
		Letero de l' Akademio de Esperanto	40,00
		Lingva	9,00
		Literatura foiro 1 jaro	58,50
		2 jaroj	109,90
		aera aldono ekster Eŭropo	18,00
		LPLP (individuaj abonoj)	54,00
		LPLP (instituciaj abonoj)	102,00
		Medicina internacia revuo (aere)	22,50
		Monato	59,00
		aera aldono	15,00
		Norvega esperantisto	18,00
		Oomoto	18,00
		Paco	19,50
		Scienca mondo	12,75
		Sennacieca revuo	13,00
		Sennaciulo	52,50
		Simpozio	14,00
		Starto (ĉeĥa)	14,00
		Svisa Esperanto-Revuo	35,00
		TEJO-tutmonde	15,00
		Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj	
		1 jaro	14,00
		2 jaroj	23,50
		3 jaroj	33,00

Bonvolu noti: Ĉar ne ĉiuj revuoj komunikis al ni sian abonkotizon por 1990, kelkaj el la indikitaj ciferoj estas provizoraj.

KULTURO

Eldoni, prezenti, legi...

Kadre de siaj streboj stimuli la Esperantan kulturan agadon, UEA anoncas jenajn novajn iniciatojn:

Kongresa Tago de la Esperanta Libro

Delonge la kongresa libroservo funkcias kiel ia jara "librofoiro" por la movado. La jena nova aranĝo celas apogi kaj vastigi tiun rolon. Dum unu tago en la 75-a Universala Kongreso en Havano, oni invitas eldonistojn, redaktorojn kaj verkistojn prezenti la libro-rikolton aperintan de post la 74-a UK en Brajtono. Kaj ne nur librojn: ankaŭ diskojn, kasedojn, vidbendojn kaj ĉiuspecajn aliajn eldonaĵojn en nia merkato.

Tiu tago funkcios kunlabore kun la kongresa libroservo. Interesitoj sendu sian detalan proponon al la konstanta kongresa adreso, kopie al la estrarano pri kulturo, Spomenka Štimec (vd. la kolofonon).

Artistoj en Esperanto

Ekde 1989 aperas listo en la Jarlibro de artistoj prezentantaj en Esperanto. La unua eldono ampleksis tridekon da nomoj; intertempe 15 pliaj ensembloj anoncis sin. La listo celas faciligi kontaktojn inter la artistoj kaj ilia potenciala publiko, je reciproka utilo. Ni do invitas ĉiujn artistojn prezentantajn en Esperanto anonci siajn programojn kaj adreson al la redaktoro de la Jarlibro kaj la estrarano pri kulturo.

Ni denove atenuigas, ke por la arta programo de la 75-a UK ekzistas konkurso. Kandidatoj proponu sin, menciante la branĉon de la programo, elementajn informojn pri la prezento kaj kondiĉojn por partopreno, al la konstanta kongresa adreso.

Servo de brokantaj libroj

La Libroservo de UEA disponas pri kelkcent brokantaj libroj. Nun haveblas listoj de la aktuala stoko, laŭ kategorio: antologioj, geografio, LLZ (Lanti/Lapenna/Zamenhof), noveloj, poezio, romanoj, Stafeto, teatro. Pliaj kategorioj aldoniĝos laŭbezzone. La prezalkulo estas normale po 0,03 gld. por ĉiu paĝo, sed tion ni modifas pro diversaj esceptaj konsideroj. Ni ankaŭ volonte akceptas listojn de serĉataj titoloj, por helpi al kolektantoj riĉigi apartajn fakojn de sia propra biblioteko. Interesitoj bonvolu anonci sin ĉe la Centra Oficejo.

LA CENTRA OFICEJO DANKAS

al ĉiuj legantoj, membroj, klientoj kaj helpantoj kiuj dum la jaro subtenis nin per konsiloj, kotizoj, mendoj kaj kuraĝigo. Ni aparte volas danki tiujn kiuj regule kunlaboris. La CO-anoj bondeziras al ĉiu el vi feliĉan novan jardekon.

Interlingvistiko iĝas grava en la moderna lingvoscienco

En novembro aperis diskuto kun SEU-vicprezidanto Sergej Kuznecov pri la organiza kaj socia evoluo de la sovetia movado. Sed Kuznecov estas ankaŭ lingvisto, profesie okupata pri Esperanto kaj pri lingvaj problemoj. Kiajn ŝancojn li vidas por sia fako?

SK: Okazas ĝuste nun gravega ŝanĝo en la situacio de interlingvistiko. Antaŭe diversaj elstaraj lingvistoj montris intereson al tiu temo, sed ĉiam kiel kroma fako, neniam kiel sia ĉefokupo. Nun aperas generacio de profesiaj interlingvistoj. Ankaŭ ĉe ni en Sovetunio la etoso ŝanĝiĝis. Komence de tiu ĉi jaro estis reorganizita la gvida konsilantaro pri la teorio kaj metodologio de lingvistiko en mia laborejo, tio estas la Instituto de Lingvoscienco en Moskvo, kiu apartenas al la Akademio de Sciencoj kaj estas unu el la plej gravaj lingvoinstitutoj en nia lando. En la nova formo de tiu konsilantaro ekzistas ok branĉoj pri la plej signifaj kampoj en la lingvistiko, inter kiuj numero sep estas interlingvistiko. Mi devas diri ke mi estis surprizita, kiam oni respondis tiel favore al mia propono starigi tian branĉon. Antaŭ

deko da jaroj oni estis ankoraŭ sufiĉe skeptika pri la temo. Sed nun la respondo estis tre pozitiva, eĉ entuziasma. Do mi nun estras tiun branĉon, kio signifas ke mi rajtas organizi grupon de kunlaborantoj kaj eldoni artikolokolektojn aŭ monografiojn pri diversaj aspektoj de interlingvistiko.

MF: *Ĉu vi povas havi ankaŭ eksterlandajn kunlaborantojn?*

SK: Jes, mi opinias ekzemple, ke tiu akademia grupo en Sovetunio povus fariĝi parto de la Internacia Kunordiga Komitato de Interlingvistoj, kiu estas lastatempe kreita surbaze de rekomendo de la 22-a Konsultiĝo de la Esperanto-asocioj de la Socialismaj Landoj, aprile en Moskvo. Tiu IKKI estas malfermita al ĉiuj, do ne nur al la landoj kiuj partoprenis la Konsultiĝon, kaj mi petas ĉiujn interesatojn komuniki al mi siajn dezirojn, rekomendojn, konsilojn kaj tiel plu. Surbaze de ili mi konstruos laborplanon por mia interlingvista fako, kiu ankaŭ povus fariĝi parto de la planoj de IKKI.

MF: *Ĉu tio ne iel konkurencos kun nia propra Centro de Esploro kaj Dokumentado, kiu jam kunigas diversajn interlingvistojn, eldonas revuon kaj aliajn studojn...?*

SK: Mi havas la impreson, ĝustan aŭ neĝustan, ke CED estas radike ligita al la Esperanto-movado. IKKI laŭ mi devas celi trovi fakan terenon en la lingvistiko ĝenerale, do aliri pli vastan rondon ol nur la esperantistojn. Tamen ja estas komunaj intereso. Antaŭaj provoj krei ekstermovadajn organizaĵojn fiaskis, ĉar ili ĉiam komprenis kiel sian taskon la konstruon de

INTERNACIA ALFABETIGA JARO 1990

Skribi por libereco

En la novembra numero, la ĉefartikolo prezentis la nunan situacion de la legipovo en la mondo, kaj skizis la respondon de Unesko. Sed kion fakte signifas nelegipovo? Jen kelkaj konsideroj ĉerpitaj el materialoj de Unesko.

Socia justeco kaj paco

Legipovo egalas potencon. Amaso da funkcioj kaj informoj en la socio ne estas alireblaj por nelegipovuloj. Tiuj ĉi iĝas elŝlositaj el la potencstrukturo. Ilia daŭra malegaleco kaŭzas frustrigon, kiu sekvigas streĉitecon, kiu siavice rezultigas konfliktojn – des pli, ĉar manko de potenco kuniras kun manko de materia bonfarto. Malriĉaj kvartaloj estas ankaŭ nelegejoj: nelegipovo ligiĝas kun manko de enspezoj, malinspira ĉirkaŭaĵo, danĝeraj san- kaj manĝkondiĉoj, malbona loĝigo kaj multaj similaj problemoj.

Ne eblas, evidente, ke la mondo estu paca kaj stabila dum centoj da milionoj da homoj vivas mallibere pro senscio. Simile, ne havas sencon aserti, ke ĉiuj homoj rajtas al leĝa protekto sen diskriminacio, se nelegipovulo evidente ne povas alvoki tian protekton sammaniere aŭ same facile kiel povas edukito. La nelegipovulo ne povas scii pri la multaj leĝaj tekstoj kaj dokumentoj; li aŭ ŝi ne nepre povas plene kompreni eventualajn akuzojn, nek kontroli la ĝustecon per kiu oni registras la respondojn. Kaj kiucele oni garantiu la rajton elekti siajn reprezentantojn per universala voĉdono, kiam en iuj landoj milionoj da homoj ne povas uzi sian voĉdonrajton, ĉar ili ne kapablas legi aŭ skribi?

Ekonomia kaj socia evoluo

Malantaŭ la mondaj ciferoj pri nelegipovo (27,7 procentoj en 1985) kaŝiĝas landaj, regionaj kaj grupaj dividoj. 98 procentoj de la nelegipovularo loĝas en la evolulandoj. En 14 el la plej malriĉaj landoj, la proporcio de nelegipovo superas 70 procentojn. Kaj kompreneble, ĉie troviĝas malegaleco inter la



legipovaj urbanoj kaj la nelegipovaj kamparanoj, kiuj estas ofte ekspluatataj kaj trompataj. Nelegipovo estas unu el la plej gravaj malhelpoj al la starigo de firma agrikultura kaj industria bazo, kaj ankaŭ signife limigas la efikecon de evoluhelpaj programoj.


Dum la lastaj jardekoj vastiĝis konscio pri la centra rolo, kiun la virinoj ludas en socia ŝanĝo kaj evoluo. Ofte citataj estas la vortoj de islama reformisto el Alĝerio, Ibn Badis: "Edukante knabon, oni edukas unuopulon; edukante knabinon, oni edukas nacion." Kaj tamen la nelegipovo restas proporcie pli alta inter virinoj: 34,9 procentoj tutmonde, 48,9 procentoj en la evolu-

nova lingvo. La nuna kompreno de la interlingvistiko estas analizo de ekzistanta internacia lingvo, Esperanto, en la kondiĉoj de la tutmonda komuniksistemo. CED estas movada scienca institucio por tio, IKKI estas ekstermovada, kaj temas pri la reciproka riĉiĝo de ambaŭ.

MF: *Ni do esperu proksiman kunlaboron. Se temas pri viaj propraj planoj, ĉu vi pretas malkaŝi kelkajn el ili?*

SK: Estas jam pretaj la manuskriptoj por du gravaj libroj en la rusa lingvo, kiujn mi eldonos. La unua estas Antologio de la Monda Interlingvistiko, aŭ AMI, kiu konsistas el 1500 manuskriptaj paĝoj. Ĝi enhavas la plej gravajn klasikajn verkojn, inkluzive kelkajn ne plu troveblajn, plus iujn aferojn neniam eldonitajn – verkojn kaj leterojn de Descartes, Leibniz, Rask, Schuchardt, Boudouin de Courtenay, Couturat, René de Saussure, Wüster, Jespersen, Ostwald, Bokarev kaj aliaj... Krome en ĝi aperos mia enkonduko al la temo kaj plurlingva terminaro de interlingvistiko. Tiu verko aperos ĉe la eldonejo Progres. La duan libron konsistigos la plena verkaro de Nikolaj Juŝimanov, kiu famiĝis pro siaj semidologiaj verkoj sed estis ankaŭ grava interlingvista kunlaboranto de Stojan kaj Boudouin. Tiu libro konsistas el 1000 tajpitaj paĝoj kaj aperos ĉe la Akademio de Sciencoj. Do vi vidas ke mi laboras nur laŭ duonmiloj da paĝoj...

MF: *Mi aŭdis ankaŭ, ke vi okupiĝis pri gramatiko de Esperanto...*



Unesko-projekto en Ekvadoro ligas alfabetigon kun trejnado por diversaj metioj. (Foto: Unesko/Dominique Roger)

landoj, en plej malbona kazo pli ol 80 procentoj. Tiu fakto sendube spegulas vastan socian diskriminacion, kiu konsistigas ne nur evoluon sed ankaŭ homrajtan problemon.

Loka kaj monda demokratio

Ni revenu al la demando pri potenco. Legipovo fundamente ŝanĝas la rilatojn en la socio, ĉar per skribado asertoj iĝas kontroleblaj, edukado ekestas pli regebla por la individuo, kaj eĉ la strukturo de la penso mem ŝanĝiĝas. Abstrakta analizado ne estas ebla, sen la povo registri la stadiojn de pensado; la mondo limiĝas al tiu mem spertita kaj memorata. Per aliro al tekstoj oni ekrigardas pli vaste, kaj tempe kaj space. Relativigi sian propran situacion, koncepti regionan aŭ tutglokan civilizacion, senti solidarecon kun homoj neniam renkontitaj, ne eblas sen la povo legi.

Jen la bazo por ĉiu demokratia ordo. Sed legipovo sola ne solvas la problemojn de la socio. Ankaŭ la skribita aŭ presita vorto estas manipulebla; ankaŭ ĝi portas proprajn katenojn. Kaj unu baza limo koncernas la lingvon. En kiu lingvo oni lernu legi? Centoj da milionoj da “legipovuloj” estas edukitaj en alia lingvo ol la denaska. La kulturaj kaj sociaj sekvoj de tio konsistigas alian dimension de la legipova problemaro. Kaj neniuj legipovulo majstras pli ol etan onon de la skribataj lingvoj, fakto pri kiu la esperantistoj aparte bone konscias.

Legipovo tiel tuŝas plurajn demandojn, centrajn ankaŭ al nia movado. En la tria artikolo de ĉi tiu serio, ni rigardos la rilaton inter legipovo kaj Esperanto.

mf

SK: Jes, tio tamen ne estas tute preta, eble nur duone ekzistanta, kvankam mi havas preskaŭ la tuton en mia kapo. Mi nomas ĝin “Teoria Gramatiko de Esperanto”. Tamen la vorto “teoria” ne implicas abundon da novaj terminoj – fakte estos malpli ol en PAG, kaj temas pri alispeca verko. Kutimaj gramatikoj kiel PAG priskribas ian instruatan, normigatan lingvon. Mi penas per tre malmultaj terminoj en plejeble populara formo priskribi la realecon kaj elserĉi la teoriajn kialojn malantaŭ ĝi.

MF: *Mi estas unu el tiuj, kiuj trovas ke PAG tro ligis sin al iu portempa stato de la lingvo. Ĉu vi havas la saman impreson?*

SK: Jes, PAG celas normigon, laŭ mi ofte nenecese. Ekzemple, ĝi preskribas la longecon kaj malvastecon de vokaloj, tiel atribuant rigidecon al la lingvo kiu tute ne devus esti tie. Esperanto neniel estas tiel rigida, kiel ĝi aspektas sur la paĝoj de PAG. Sed mia gramatiko ne celas anstataŭi PAG, ĉar ili okupas malsamajn ekologiajn niĉojn. Kaj entute estas konflikto inter tiu projekto kaj tre interesa projekto pri grandaj vortaroj, kiu ankaŭ tre allogas min. Oni provos registri la vere uzatan lingvon surbaze de tekstoj kaj alia materialo, kreante grandegan oftecvortaron de la lingvo, kaj komparos tion kun la jam ekzistantaj normdonaj vortaroj kaj kun la Fundamenta Vortaro por provi elverki ion komunan. Kiel tria fazo necesos internacia kunlaboro por plenigi lakunojn en la konceptprovizo.

MF: *Denove iuj homoj jam okupiĝas pri parto de tiu kampo, ĉu ne? Tio evidente rilatas al la laboroj kaj celoj de la maŝintraduka projekto DLT kaj la movadaj terminologoj.*

SK: Certe ekzistas komunaj trajtoj, jes. Tamen DLT esploras la tradukadon de tekstoj, ne vortoj, kaj la problemoj de vortkombino necesigas sintaksan kaj semantikan analizojn. Tiu projekto efektive estas tre interesa, ĉar ĝi malfermis novan direkton en la esploroj. Mi cetere konsentis membriĝi en internacia konsilantaro pri ĝi. Sed mi tamen vidas plurajn problemojn. Lingvo estas “izoforma” kun la konsciata universo, ĝi devas iel reprezenti la tuton, kaj oni ne povas tiel facile modeli la universon.

MF: *Se temas pri la estonteco, kion vi antaŭvidas por la pozicio de interlingvistiko post dek aŭ dudek jaroj?*

SK: Mi principe ne kredas prognozojn. Komence de ĉi tiu jarcento oni parolis pri tio, ke la homoj flugos, sed pere de flugantaj ĉevaloj. Tamen oni povas prognozi la lingvo-situacion en la mondo. Mi pli-malpli certas ke ĝi akriĝos. Unuavice tio okazos ĉar ĉiuj establiĝintaj lingvoj pliampleksigas kaj diversigas sian uzadon. Ĝuste tiu diverseco estas promesplena por Esperanto.

MF: *Sed ĝi tamen havas konkurantojn...*

SK: Ne. Esperanto ne estas rivalo al iuj ajn aliaj lingvoj, ankaŭ ne al la angla. En Sovetunio, ekzemple, la rusa estas ege uzata, ankaŭ interpopole. Mi vidis multege da homoj kiuj bone parolas la rusan. Sed senerara uzo estas tre rara fenomeno. Ĝuste same okazas pri la germana, la franca kaj speciale pri la angla, la fama internacia “Broken English” (balbutata angla). Esperanto estas la sola internacia lingvo kiu principe povas esti senerare parolata.

MF: *Ĉu vi efektive kredas tion grava? Multaj homoj ŝajnas tute kontentaj pri sia balbutata angla.*

SK: La vera lingva baro estas psikologia, ne praktika; ne la nescio de signoj, sed hezito en ties uzo. Esperanto estas la sola lingvo, kiu ne kreas tiun “interlingvan ŝokon”. La angla havas siajn avantaĝojn, ĉar per ĝi oni atingas multe pli da homoj kaj funkcioj ol per Esperanto. Sed la interlingva ŝoko ne malaperas, ĝi estas ĉie. Esperanto estas nuntempe pli limigita, sed ĝi neniel sentigas malplivalorecon al siaj parolantoj.

intervjuis Mark Fettes

La adreso de Sergej Kuznecov estas: ul. Gorkogo, d. 19, kv. 67, SU-103050 Moskvo.

Kvin jaroj da penado jam portas konkretajn rezultojn

De post la fondiĝo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj (STEA sub ĈAS) en la 15-a de junio, 1984, ni konsekvence strebis akceli la disvastigon kaj aplikadon de Esperanto en la scienc-teknika kampo. Ni opinias, ke por ke Esperanto plidisvolviĝu, oni nepre devas vaste uzi kaj popularigi ĝin ne nur en la aferoj pri politiko, lingvo, literaturo, muziko, teatro, turismo, korespondado kaj agadoj de Esperanto-klubo, sed ankaŭ en la kampoj de scienco, tekniko, ekonomio kaj komerco kaj en produktaj agadoj de la socio. Nur tiel Esperanto fariĝos vera lingvo, nemalhavebla en la homa ĉiutaga vivo, kaj ludos rolon en la socia progresado kaj evoluado. Jen raporto pri niaj spertoj el la pasintaj kvin jaroj.

Trejnado kaj aplikado en kombino

“Lerni por uzi” estas nia principo ĉiam sekvata en kulturado de esperantistoj. Ekzemple, en la E-kursoj ni ĉiam prenis la realajn librojn, ĵurnalojn, revuojn kaj leterojn kiel instru-materialojn. En la komenco ni instruis la lernantojn en konversacio pri la vivo; tion sekvis legado ĝenerala kaj serioza por altigi lingvonivelon; post tio ni ekzercis ilin per tradukado kaj verkado. Post tiel interesa trejnado en 3-8 monatoj la kursanoj vere povis korespondi kun eksterlandaj esperantistoj, labori en internacia konferenco, traduki artikolojn por la revuo *Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj* (TST) kaj la bulteno *Informilo de Scienco kaj Tekniko* (IST) kaj viziti aliajn landojn.

Nova tereno por scienc-teknika interŝanĝo

Plejparto de la sciencaj revuoj en diversaj landoj estas eldonataj en la nacia lingvo, kaj estas tre malfacile scii pri la evoluo de la mondaj sciencoj kaj tekniko pro tiu lingva baro. Nun multaj sciencistoj jam komprenas, ke Esperanto kiel ponto ebligas al la scienc-teknika interŝanĝo vojon proksiman, ireblan kaj ekonomie favoran. La revuo TST fondita de STEA aperis vere sub tiu situacio. Ĝi eldoniĝas en Esperanto kaj la ĉina lingvo, enhavas originalajn kaj tradukitajn artikolojn pri la sama temo, kaj ludas duoblan rolon kiel akademia kaj traduka gazeto. Tial ĝi tre taŭgas por diversaj legantoj en- kaj eksterlandaj, inkluzive de komencantoj. Precipe fakuloj en la scienc-teknika kampo interesiĝas pri ĝi, povante ricevi alilandajn informojn pri scienco kaj tekniko. Iuj esperantistoj en Sovetunio, FR Germanio, Japanio, Irano k.a. tradukis artikolojn de TST en sian propran lingvon por aperigi ilin en lokaj ĵurnaloj aŭ gazetoj. Ekzemple, sovetia fizikisto M. T. Popov tradukis la artikolon “Nova atingo en esploro pri meĥanismo de metala oksidiĝo” de d-ino Guan Ruonan (TST 1986/1) en la rusan lingvon por sovetia specialisto, kiu ankoraŭ ne komprenis Esperanton. La artikolo “Evoluo kaj apliko de sengrunda kultivado” de Ma Taihe (TST 1988/2) estis tradukita de A. Vaitilavičius en la litovan lingvon kaj reaperis en la revuo hortikultura *Mūsų sodai* (Niaj ĝardenoj). Ankaŭ la artikolo “Pri acidiĝo en Skandinavio” de Ingwart Ullrich kaj Johann Pachter (TST 1986/3) multe interesis s-ron Young-tae Ma, sudkorea esperantisto, kaj reaperis en sudkorea gazeto post traduko.

Multaj sciencistoj Esperanton nekompreneblaj tamen tre envias, ke la revuo TST povas trovi multajn legantojn en diversaj landoj de la mondo. Tial, ili tre deziras publikigi en ĝi artikolon pri sia plej nova sciencesplora atingo. Ekzemple, usona scienca verkisto J. G. Richardson, antaŭa ĉefredaktoro de *Impact of*

Science on Society (Influo de scienco sur la socion) eldonata de Unesko en la angla kaj franca lingvoj, multe aprobas disvastigon de Esperanto en la scienc-teknika kampo. Okaze de la dua Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko, li sendis al ni sian franclingvan referaĵon, kiun ni aperigis en la 3-a numero, 1989 de TST. Ankaŭ sciencistoj de Ĉinio, Sovetunio, Usono, FR Germanio, Germana DR montris similan deziron. Kaj nemalmultaj esperantistoj tradukis sciencajn artikolojn el la nacia lingvo en Esperanton por aperigi ilin en TST. Aparte interese estas ke la referaĵo “Esploro pri kuracado de AIDS per akupunkturo en la imunologia vidpunkto” de Wang Yunzi kaj Gui Wenbo (TST 1988/3-4) estis represita en *Mondo de Universitato* 1988/3 en Suda Koreio, kaj poste ĝi estis elektita en la rubriko “Bibliografiaj Notoj” de *Heroldo de Esperanto* 1989/6 kiel interesa artikolo en Esperanto. Samtempe elektita artikolo estas ankaŭ “Dek sanigaj metodoj kaj Ertiangong” de Zhao Hongbin el la sama numero de la revuo.

Krom TST ni eldonis ankaŭ sciencon verkon *Atoma klarigo de materialaj proprecoj* de Rob Vetter, docento pri fiziko en Nederlando, per komuna kapitalo en la tempodaŭro de unu jaro. La aŭtoro de la libro alte taksis nian eldonlaboron kaj esperis, ke troviĝos pli da volontuloj-verkistoj, kiuj povos en pli mallonga tempo kompili Esperantajn lernolibrojn kaj eldoni ilin. Ni volonte faros nian kontribuon por tiu afero.


Renkontiĝoj de sciencistoj

Nia asocio ofte sendis sciencistajn grupojn al eksterlando por pli kunligi sin kun diverslandaj scienc-teknikaj kampoj; kaj samtempe ni ankaŭ prizorgas la venintajn eksterlandajn sciencistojn kaj helpas ilin en kontaktoj kun ĉinaj samfakuloj. Ekzemple, okaze de la 71-a UK en Pekino en 1986, Barbara Despiney, estrarano de UEA kaj esploristino pri ekonomiko de la Tria Mondo, povis viziti pere de nia asocio la Instituton pri Sovetunio, Orienta Eŭropo, Okcidenta Azio kaj Afriko sub la Ĉina Akademio de Sociologio, tiel starigante amikan rilaton inter si kaj ĉinaj samfakuloj. En 1986, inĝeniero kaj komputisto Uli Ender de FR Germanio vizitis la Komputilan Instituton de ĈAS ankaŭ pere de nia asocio; en 1987, hungaraj hidraŭlikistoj d-roj Gerencser Árpád kaj Gether István vizitis Ĉinion kaj estis invititaj de nia asocio al ĈAS por tie prelegi kaj renkontiĝi kun ĉinaj hidraŭlikistoj. En 1988, ni akompanis polan agrobiologon s-ron Edmond Sidorowicz al bredejo de la laktbovinoj en la orienta antaŭurba kultivejo de Pekino kaj transdonis lian donacon de bonspeciaj semoj de tritiko al la Ĉina Agronomia Universitato.



Interŝanĝo de informoj en la internacia korespondado

Ni ankaŭ interkomunikigis sciencistojn ĉinajn kaj eksterlandajn, kiuj ne povis viziti Ĉinion por interŝanĝi sciencajn informojn. La 3-an de julio, 1986, ni ricevis leteron de universitato Udine, Italio kun la peto, ke ni traduku en Esperanton



Sveda matematikisto Christer Kiselman kaj ĉina biokemiisto Jiang Lijin kontribuis sian fakon scion al la dua IAKSTE, 1988.

tri sciencajn artikolojn aperigitajn respektive en *Acta Botanica Sinica* (Botanika ĵurnalo) kaj *Acta Phytophysiological Sinica* (Fitofiziologia ĵurnalo), kiuj temas pri novaj teknikoj kaj eksperimentoj de genetiko kaj bonspesia kulturado de plantoj. La itala flanko deziris scii pri la plej nova sciencesplora atingo de ĉinaj esploristoj en tiu flanko. Ni tuj eltrovis la menciitajn ĵurnalojn en la biblioteko de ĈAS kaj tradukis la artikolojn en Esperanton. Dum la tradukado ni iam diskutis kune kun la aŭtoroj de la artikoloj pri terminaj problemoj. Ili ĉiuj laŭdis nian laboron opiniante, ke estas ege subteninde fari tiel realan, akuratan, oftan akademian interŝanĝon en Esperanto, kio certe kontribuos por la scienc-teknika evoluo. Poste, ni informiĝis, ke sciencesploristoj de la universitato Udine faris similan eksperimenton laŭ la ĉina sperto kaj ricevis novan atingon. Krome, silvikulturisto Johann Pachter en FR Germanio korespondadis en Esperanto kun la Forst-grunda Instituto sub ĈAS en Shenyang, Ĉinio kaj interŝanĝadas koncernajn materialojn.

Por rapidigi la informan interŝanĝon, nia asocio eldonas ankaŭ *Informilo de Scienco kaj Tekniko* kiel suplementon de TST. La tria numero de IST estas en presado. Oni kontentas pri eldonado de la informilo, ĉar ĝi akcelis interkompreniĝon kaj ebligis kunlaboron en la scienc-teknika kaj ekonomi-komerca kampoj.

Sinteza rolo de la Internaciaj Akademias Konferencoj

Por popularigi la scienc-teknikan interŝanĝon en Esperanto, nia asocio jam okazigis dufoje IAKSTE. En la unua konferenco (22-24 julio, 1986) partoprenis 300 sciencistoj kaj teknikistoj el 18 landoj kaj 102 referaĵoj estis legataj, kaj en la dua (10-16 aŭgusto, 1988) partoprenis pli ol 1400 sciencistoj-esperantistoj el 23 landoj kaj regionoj kaj pli ol 300 referaĵoj estis legataj. Oni diris, ke okazigo de tiu konferenco estas senprecedenca en la kombinaĵo de Esperanto kun scienco kaj tekniko. Do, pro kio ĝi altiris tiel multe da homoj? Ni resumas tion per jenaj punktoj:

(1) Ĝi havas karakteron multfakan kaj sintezan, kiu ebligas al diverskampaj sciencistoj kaj teknikistoj partopreni ĝin. Pri gravaj esplortemoj oni povis diskuti el diversaj rilataj vidpunktoj, ekzemple pri la problemoj de ekologia protektado kaj malebligo de katastrofoj de la tuta mondo, kaj pri la reciproka influo de la scienc-tekniko, la ekonomio kaj la socio de la mondo, ktp.

(2) En la tuta konferenco partoprenis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ sciencistoj, kiuj ne komprenas Esperanton sed tamen volonte subtenas la evoluon de Esperanto.

Laŭ la rezolucioj de la du konferencoj ni okazigos ĉiun duan jaron la konferencojn, kiu jam fariĝis granda movforto por popularigi Esperanton kaj altigi la lingvonivelon en la scienc-teknika kampo. Ni jam dissendis nian anoncon pri okazigo de la tria IAKSTE en Pekino inter la 25-a kaj 30-a de majo, 1990. Ni kredas, ke tio certe ricevos varman subtenon en- kaj eksterlande.

Malfermi novan vojon por pli oftaj akademias interŝanĝoj

Kiel konate, nun ni preparas fondi Internacian Esperantan Scienc-teknikan Universitaton kunlabore kun famaj universitatoj, sciencesploraj institucioj kaj industriaj kaj komercaj rondoj en- kaj eksterlandaj. La universitato havos oficialan kaj kompletan strukturon, bone kvalifikitajn instruistojn, variajn studtemojn kaj longan aŭ mallongan lerno-tempodaŭron. En la komenca periodo funkcios urĝe bezonataj fakoj de ekonomio, administrado, tekniko kaj ĉinstilaj kulturo, medicino k.a. Poste laŭ bezono ni plimultigos ĝiajn studtemojn. Plej grave, Esperanto estos ĝia unua laborlingvo. La universitato disponigos al esperantistoj konstantan ejon kaj pli bonan ŝancon por pli oftaj akademias interŝanĝoj kaj aplikado en diversaj kampoj. Ni jam ricevis varman eĥon enlandan kaj eksterlandan. Tamen efektivigo de nia projekto bezonas komunan klopodon. Plej ŝlosila estas la starigo de fonduso, kiu kolektos monon en- kaj eksterlande por solvi la problemojn de vojaĝo kaj vivo de instruistoj kaj studentoj, kaj kontribuos al eldonado de instrumaterialoj kaj aliaj legaĵoj por tiuj, kiuj deziras lerni Esperanton en kaj ekster la universitato.

Lastatempe, multaj leteroj flugis al ni por demandi kiam komenciĝos la universitato kaj kiajn lecionojn oni donados. Ni respondas, ke ni de nun komencas kaj faros tion, kio estos tuj efektivebla. Ekzemple, en septembro ĉi-jara ni okazigis sciencon simpozion kaj E-kurson kunlabore kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino. La simpozio estis miniaturo de nia universitato. Nuntempe, ni bonvenigas eksterlandajn instruistojn kaj studentojn, kiuj deziras veni al Ĉinio kun la supre diritaj celoj, nur se ili povos mem pagi por sia vojaĝo. Estonte ili venos eble senpage dank' al nia fonduso. Sukceson decidus homa penado. Ni kredas, ke la funkciigo de la universitato malfermos novan vojon por konstanta aplikado de Esperanto. Nia eminenta verkisto Lusin diris: La vojo nature formiĝos dank' al irado de ĉiam pli multaj homoj.

Shen Chenru (Ŝen Ĉenĵu), Ĉinio

Ĉu fake okupiĝi, ĉu vivteni la movadon?

Orientgermana komputisto Michael Behr raportas pri siaj terminologiaj spertoj kaj problemoj.

Unuaj naivaj paŝoj

Dum la jaroj 1980 ĝis 1985, kelkaj esperantistaj komputistoj en GDR komencis kolekti fakvortojn pri komputado. Mi verkis nefacile manipuleblan programon por administri ilin sur disketo. Evidentiĝis, ke temas pri senfina kaj nesistema amaso da fakvortoj, en kiu aperas ankaŭ ĝeneralsciencaj, apudfakaj kaj interfakaj vortoj. Post okupiĝo pri ĝenerala terminologio, ni komprenis, ke necesas aldoni difinojn, limigi la fakon kaj prezenti ĉion laŭ ia sistemo. Speciale la Terminologia Kurso, okazinta en 1986 en Roudnice nad Labem (CSSR), kaj la tie eldonita samtitola libreto de Jan Werner ege klerigis nin [vd. la recenzon en majo, p. 89. –red.] Krome ni havis kaj havas bonajn kontaktojn kun la gvidantoj de TEC kaj ricevas daŭre kreskantan materialon. En 1988 la Komputista Fakrondo (KFR) en GDREA decidis establi Terminografian Komisionon pri Komputiko (TK/K). En la Fondiĝa Deklaro el 1988-06-06 (prilaborita versio el 1988-12-04) ni difinis la laborplanon, la limigon de la fako, la kunlaborantojn, la provizoran transliteradon el la rusa-kirila alfabeto, niajn gvidprincipojn por la ellaborado de normaj terminaroj, la regularojn por kreantoj kaj kunlaborantoj, la mal-longigojn kaj la teknikan aranĝon. Konforme al tiuj decidoj, mi modifis kaj pliampleksigis miajn komputilajn programojn.

Por havi laŭsisteme ordigitan font-materialon, ni devis decidi, kiu el la internacie konataj, sed nacilingvaj terminaroj estu nia modelo. En niaj vicoj tiutempe ne ekzistis kunlaborantoj bone komprenantaj la anglan lingvon, kaj krome ni dum longa tempo ne sukcesis havigi al ni la ISO-normon 2382, la usonan ANSI/IEE-normon aŭ la okcidentan normon DIN 44300 el FRG. Pro tio ni prenis kiel modelon la havigeblan IFIP-terminaron, kvankam iomete eksmodiĝintan, kaj intencas poste aldoni la mankantajn pli modernajn nociojn. Nuntempe, post la estiĝo de

bona internacia kunlaboro helpe de Esperanto, ni disponas pri la menciitaj terminaroj kaj uzas ilin por kompari kaj pliriĉigi niajn ellaboraĵojn.

La kreado de la kolektivo

Laŭ ĝenerala sperto, mi opinias, ke estas pli verŝajne persvadi aliajn fakulojn al kunlaboro, se ili ne devas ellabori, sed “nur” korekti aŭ pliampleksigi ricevatajn materialojn. Pro tio mi komprenas mian rolon en la Terminografia Komisiono esti tiu de ellaboranto de malnetoj kaj redaktanto de ĉiuj opinioj, kritikoj, aldonoj kaj komentoj.

Ne ĉiu homo posedas la afablecon respondi al letero. Pro tio mi unuatempe dissendis stelforme al ĉirkaŭ dudek personoj la unuajn malnetojn, kaj nur triono el ili respondis. Se mi estus sendinta nur unu ekzempleron rondvojaĝe kun la peto al ĉiu plusendi ĝin al difinita adreso, la afero estus fiaskinta. Tio signifas, ke inter la libertempe laborantaj kolegoj nur la stelforma kontaktmaniero eblas, dume la ringforma nepre mortigus la aferon. La stelforma metodo postulas pli multe da laboro de la redaktanto kaj multe pli da papero, sed vivtenas la kunlaboradon tiel longe kiel la redaktanto aktivas. Estus bonege, se ne nur unu, sed du aŭ tri redaktantoj loĝus en unu loko, sed tiel la realo ne aspektas.

Tamen mi ĝojas, ke nia kolektivo kreskis, kaj ke ni hodiaŭ estas dek kunlaborantoj el sep landoj.

Spertoj rilate al la sinonimeco

La IFIP-terminaro konsistas el ĉapitroj, el kiuj ĉiu enhavas 30 ĝis 70 terminokompleksojn (ni diru: averaĝe 50). Unue mi ellaboris la unuajn kvin ĉapitrojn tiel, ke mi por ĉiu terminokomplekso kunmetis la jenon: n-ro; 1-10 sinonimoj en Esperanto; 1-3 sinonimoj por la lingvoj angla, franca, rusa, germana; difino en Esperanto kun referencoj al aliaj, antaŭe difinitaj terminoj. Tiam mi petis la kunlaborantojn indiki erarojn, kaj indiki preferon por unu el la Esperantaj sinonimoj.

La rezulto estis, ke la preferoj de la kunlaborantoj ofte estis diversaj, sen sufiĉa indiko de la argumentoj. Pro tio, en dua etapo, mi aldonis al la nocikompleksoj de la 1-a kaj 3-a ĉapitroj miajn komentojn al la Esperantaj sinonimoj kaj miajn

La 27 jaroj de post la 1-a Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco (Kopenhago 1962) ne faciligis la taskon de la movadaj sciencistoj.



argumentojn pri mia prefero. Tio estis ege temporaba afero, tamen necesa. Denove mi dissendis la du ĉapitrojn kaj petis la kolegojn indiki erarojn, kaj indiki preferon kun bone pripensita komento.

Responde, la kunlaborantoj sendis pluajn komentojn por ĉiu terminokomplekso, kaj finfine mi povis rekoni, kiun sinonimon preferas la plimulto el ili. Por esti justa, mi kopie entajpis ĉiujn komentojn de la aliaj, kio denove bezonis multe da tempo, kaj mi aldonis finan komenton kun decidopropono favore al certa sinonimo. Sed feliĉe ni rikoltis kroman efikon: la kolegoj Pokrovskij (SU) kaj Weichert (FRG) ellaboris lingvistike alt-nivelajn artikolojn pri diversaj sinonimecoj, kiuj parte superis la laikan nivelon de la redaktanto.

Teoriaj necertecoj rilate al difinoj

Komparante niajn koncizajn difinojn en niaj terminokompleksoj kun la difinoj de ISO aŭ DIN, ni devas konstati, ke la aliaj ne aplikas la klasikan skemon, kiun mi preferas, kaj kiun mi tiel klarigas: *En la difino rajtas aperi nur tiuj referencoj, kiuj jam antaŭe estis difinitaj en la sama terminaro.* Sed DIN ekzemple ofte difinas per prezento de konsistpartoj de la difinato, kiuj ne estis difinitaj en la antaŭaj difinoj. Krome, en DIN la difinoj ofte estas tro ampleksaj, ili ne limigas sin al la esenco de la afero. Konklude, mi pledas kontraŭ la propono sklave traduki nacilingvan normon. Ni uzu ilin por komparoj kaj lernu el ili.

La deziroj de estintaj kaj estontaj uzantoj

Mi citas nian prapatron Eugen Wüster el la antaŭparolo de la *Maŝinfaka Esperanto-vortaro priedementa*, Leipzig 1923: "Terminaroj sen tradukaĵoj, do vortaroj lernolibre aranĝitaj havas valoron nur por rondoj lingve speciale interesitaj. La ordinara uzanto volas sen pluaĵoj trovi tradukaĵon por donita esprimo. La ellaboro de taŭga vortoprovizo ja povas okazi nur terminare, t.e. laŭ la ideoj interrilatoj kaj ne laŭ alfabeto; sed se en tia maniero terminaro estas ellaborita, sufiĉas, unue publikigi la rezultaĵojn en formo rekte utiligebla de la praktiko."

Ni devas konfesi, ke por atingi tion la Esperanto-movado bremsas nin. La redaktanto kaj la kolegoj, krom pri terminografio, kunlaboras libertempe en la Esperanto-movado (instruas, preparas aranĝojn, redaktas informilojn ktp). Sekve okazas, ke li aŭ ili eĉ dum monatoj ne tuŝas la aferon de la terminografio, antaŭ ol denove okupiĝi pri ĝi. Pro tio la afero lamas. Nia ĉina kolego Liu Haitao skribis: "Laŭ mia opinio ni devas plirapidigi nian laboron, la ripeta laboro [t.e. la aldono de komentoj! -M.B.] estas nenecesa kaj sensignifa, la vidpunkto kaj opinio de unuopulo [temis pri s-ro Eichholz] ne devas malhelpi la plenumon de nia laborplano, se ne, ni denove enfalos en senfinan konflikton kiel kelkaj abortintaj projektoj."

Konkludoj

1. *Niaj fortoj ne sufiĉas.* Ekzistas tro malmultaj esperantistaj fakuloj. La Esperanto-movado tro malrapide produktas novajn. Kontraŭe, ĝi estas tiom malforta, ke la fakuloj devas kunlaboregi en ĝi por vivteni ĝin. La praktiko montras, ke neniu fakulo povas okupiĝi ekskluzive nur pri faka aŭ terminografia aplikado de la lingvo. La sekvoj estas simplaj. La planoj por eldoni iun vortaron aŭ terminaron ne estas plenumebaj, la memdifinitaj limdatoj multfoje prokrastiĝas. El tio sekvas ankaŭ, ke la ideoj de s-ro Eichholz pri PekoTeko kaj pri la Elektronika Terminarego [*Esperanto* 1989, p. 6], kiuj postulas multoblan kvanton da laboro, tute ne estas realigeblaj kaj restas belaj revoj.

2. *Havigi duonproduktojn indas.* La ĉapitroj aŭ partoj de terminaro enhavu indikojn pri la stato de la ellaborado. Se iu interesiĝanto deziras havi la ĝisnunajn rezultojn, li sendu disketon al la redaktanto kaj li ricevos kopion de la nuna stato

ALVOKO

Malgraŭ diversaj obstakloj kaj problemoj, manko de homfortoj kaj materiaj rimedoj, Terminologia Esperanto-Centro paŝon post paŝo elformiĝas. Aktuale ĝi pretigas sin por fariĝi aktiva membro en la internacia terminologia reto TermNet kaj tiel envicigi Esperanton inter la terminologie konsiderindajn lingvojn. Tio jam ne estas afero nur de TEC, sed de la tuta Esperanto-movado. Ĉu la TermNet-membreco restos formala (kaj do la sufiĉe alta kotizo estos malŝparita), aŭ ĉu ni sukcesos plene profiti el la internacia kunlaboro por altnivele evoluigi nian fakan lingvon kaj eble eĉ pruvi, ke Esperanto pro sia planiteco estas speciale taŭga terminologio-lingvo – tio dependos i.a. de la komprenemo kaj helpo de la tuta Esperanta komunumo. Do, ankaŭ de vi!

Se vi volas subteni la agadon de TEC kaj vastigi la intereson pri ĝi, jen kelkaj eblecoj:

1. Se vi interesiĝas pri kunlaboro en Terminografia Komisiono (TK) por ellabori terminaron de via propra (scienca) fako, petu registriĝon kiel Fakulo.

2. Se vi deziras gvidi tian TK, reprezentu TEC-on en via faka aŭ landa Esperanto-Asocio aŭ en ekstermovada organizaĵo, aŭ alimaniere partopreni en la organizado-gvidado de nia institucio, kaj pretas investi tempon, forton kaj eble eĉ monon por instrui pri diversaj aspektoj de terminologio, aniĝu en TEC kiel Organizanto.

3. Se vi (nur) volas regule ricevi informojn pri TEC, anoncu tion kaj vi estos registrita kiel Interesito.

Kontaktadreso por 1-3 estas:

TEC – Sekcio de Reprezentantoj

W. Blanke, O.-Nagel-Str.110, Pf. 113-05

DDR-1141 Berlin.

4. Se vi volas (kaj povas) finance subteni la agadon de TEC, bonvolu transpagi vian donacon al UEA en Rotterdam, al la Fondaĵo Wüster. Eĉ malgrandaj donacoj bonvenos – ili validos kiel morala subteno!

W. Blanke

de la terminaro (se la leĝoj kaj/aŭ la praktiko de limkontroloj tion permesas).

Nuntempe (oktobre 1989) la stato de la ellaborado estas tia, ke nia TK/K povas proponi al la aproba procedo de TEC la 1-an kaj la 3-an ĉapitrojn (t.e. 109 terminokompleksojn). La aliaj estas ankoraŭ temoj por diskuto en nia TK/K, tamen eblas ankaŭ ilin transdoni per disketo por utiligo de la ĝisnunaj rezultoj.

3. *Necesas daŭrigi la laboron sen limdatoj.* Laŭ niaj disponeblaj fortoj ni daŭrigu la laboron, sed ni ne plu havu iluziojn pri finpretiĝo ĝis certa limdato. Sed ankaŭ povas okazi, ke ni petos aliajn kolegojn prefere helpi vivteni la Esperantomovadon kaj ne plu daŭrigi la terminografian laboron, ĉar nenio povas funkcii sen la bazo el homoj regantaj Esperanton.

Michael Behr

Koburger Str. 83, 7113 Markkleeberg, Germana DR

Demokratiigo kaj Esperanto

Dum la lastaj du-tri jaroj ni, kiuj vivas en orienteŭropaj landoj, estas partoprenantoj de gravaj sociaj transformoj. Personoj de malsamaj mondrigardoj diversmaniere prijuĝas la eventojn. Malgraŭ malsameco en detaloj, kelkaj tendencoj jam draste konturiĝas. En la sociaj aliformiĝoj centran lokon sendube okupas demokratiigo kaj samtempa fortikiĝo de nacia konscio. Ŝajnas al mi ke la plimulto de la esperantistoj konsentas pri miaj ĵusaj konstatoj.

Kaj se ŝanĝiĝas la politika medio, estas pli ol evidente, ke *necesas adapti ankaŭ la movadon* al la aktualaj cirkonstancoj, ĉar finfine ĉio reciproke interefikas.

Ni, esperantistoj de la koncerna regiono, devas jubile saluti la politikajn okazintaĵojn ĉar, kvankam ĝis hodiaŭ ankoraŭ nenia reformo tuŝis rekte nian movadon aŭ lingvon, nura ekzisto de la fakto, ke nia tuta soci-politika medio fariĝis pli libera, vole-nevole favoras nian aferon: ju pli da libereco en la interhomaj kontaktoj, ju malpli da suspekto en internacia kunagado, *des pli fekunda fariĝas la grundo por la internacia lingvo*.

Ĉio ĉi, kompreneble, ne solvas la problemon de internacia lingva komunikado, tamen ekestas favora kondiĉaro, sen kies ekzisto la ideo ne povas disflori. Alivorte: *ni devas subteni ĉiujn reformojn, kiuj pliproksimigas humanismon kaj demokration*, ĉar laborante por la efektivigo de tiuj ideoj, eĉ se ne rekte, ni luktas por nia fina celo.

Kaj estas memkompreneble, ke ni ne povas resti eksteraj rigardantoj de la rapide preterpasantaj eventoj. *Ni devas aktive interveni kaj influi kiel eble plej pozitive la okazaĵojn*.

Kie mi vidas la plej favoran koincidon de nia strebado kaj tiu de la reformistoj? En penado al demokratio.

En batalado por demokratio ĉie aperas la demando de la lingvoj, plej akre, evidente, tiu de la nacia lingvo. Ne ekzistas forto eĉ plej despotisma, kiu povus nun sukcese subpremi la nacian identecon, kaj ties plej okulfrapan manifestiĝon: la etnan lingvon.

Lukto por plenrajta uzado de malgrandaj etnaj lingvoj, unuflanke, kaj kreskanta internacia kunlaboro, aliflanke, ŝovas nian aferon, eble eĉ senvole, en la unuan agadplanon.

La grandpotencoj jam estas pretaj preskaŭ ĉie akcepti la politikajn rajtojn de malgrandaj popoloj, ĉar kion ili povus ja fari kontraŭ la kreskanta premo de vastaj popolamasoj; sed rekonante la rajton pri libera uzo de etna lingvo interne de la koncerna regiono, ili tuj "afable" rekomendas sian lingvon por supernaciaj kontaktoj, ĉar estas evidente, ke izolitaj lingvetoj ne taŭgas por internacia komunikado. Kaj ili, ŝajne, tute pravas. Sed tio estas nur trompa evidenteco, ni ĉiuj konscias ja bone. Kial?

Ĉar ĉu povas regi vera demokratio tie, kie unu homgrupo (kaj ĉiam la pli malriĉa) devas humiliĝi antaŭ alia, kaj estas devigata elspezi enorme grandajn spiritajn kaj financajn rimedojn simple pro iaj tradiciaj politikaj aŭ ekonomiaj kialoj (kiuj cetere estas nestabilaj, ŝanĝiĝemaj)? *Unuj balbutadas* post plurjara sindona laboro por la alproprigo de certa lingvo, dum *aliaj libere kaj brile majstras* ĝin "sen la plej malgranda investado spirita aŭ materia". Inter tiaj cirkonstancoj ĉu oni povas paroli pri vera justeco, egaleco aŭ demokratio?

Miaopinie certe ne!

La malgrandaj nacioj kun izolitaj lingvoj ne povas iri la vojon de la grandaj ŝtatoj, ili havas ja nenian ŝancon altrudi sian lingvon al la internacia komunikado. Ĝis nun por translimaj kontaktoj ili elektis do, *sub premo de neceso* (kaj la neceso estas

granda sinjoro!) la alian vojon: la alprenon de iu el la mond-lingvoj.

Sed ĉu ekzistas nur tiuj du vojoj?

Se oni rigardas la aferon izolita, t.e. prenas en konsideron nur iun nacieton kaj ties najbaran naciegon, tiam la rezulto de la batalo ne estas duba.

Tamen, malgraŭ ĉia dubo, ekzistas ankaŭ alia vojo: *la tria*, kiu estas la unusola demokratia solvo de la problemo, kondiĉe ke la nacioj atingis certan ŝtupon de evoluo.

Dum la malgrandaj nacioj, balbutantaj en internaciaj kongresoj, kunvenoj, renkontiĝoj kaj aliaj en iu "fremda" lingvo, ne agnoskas, ke *en unueco estas forto*, ilia sorto estas absolute senespera. Sed kiam kelke, eĉ dekoj da malgrandaj popoloj rekonas, ke ilia sorto estas la sama, kaj laŭ la tradicia vojo ili neniam povos atingi la nivelon de la privilegiitaj, malgraŭ eĉ superhomaj fortostreĉoj, tiam ili jam havas ŝancon por vera justa kaj malpli kosta solvo, eble eĉ pli perfekta ol tiu de la "elektitaj". Al la nuna legantaro mi ne bezonas nomi tiun solvon, kiun ni ĉiuj konas kaj akceptas.

Antaŭ ol fini la artikolon mi tamen volas ankoraŭ prilumi la rolon de la organizita esperantistaro.

Dum jardekoj ni atendis, ke iu aŭtoritata internacia organizaĵo decidu pri la enkonduko de Esperanto. Multaj niaj adeptoj eĉ nuntempe revas pri tio.



Eŭropo 1989: ĉie falis la obstinaj baroj.

Miaopinie tia koncepto sendube apartenas al la regno de revoj kaj iluzioj. Temas ja pri revolucia paŝo en la historio de la homaro. Pri tiaj decidoj oni vane atendas la subtenon de rutinuloj, kiuj interkrampe apenaŭ sentas la mankon de la internacia lingvo, kaj el kiuj eble nur unu aŭ du personoj konas funde Esperanton. Sed eĉ se ili ĉiuj estus entuziasmaj adeptoj de la internacia lingvo, ili ne kuraĝus favore decidi vidante ke ni, kiuj laŭte predikas pri internacia kunlaboro helpe de Esperanto, ni mem ne unuigis niajn disigitajn fortojn, kaj ĝis nun ne povis frakasi la murojn, kiuj nin fakte dividas, kaj pri kies detruado ni tiel verve deklamas aŭ kantas.

Ne povas esti dubo pri tio, ke sekvindan ekzemplon oni atendas ĝuste de la apostoloj de la ideo kaj, se ili ne kuraĝas transpaŝi la jarcentajn murojn de rutino en lingvaj kontaktoj, *kiu do faros tion en nomo nia?*

"Kruco" (Hungario)

Fondoŝtono de la esperantologio moderna

Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj. Gaston Waringhien (1901). Rotterdam: UEA, 1989 (dua, reviziita eldono kun Apendico). Jubilea Kolekto 3. 452p. 23cm. Bind. 48,00 gld.

La konata GDR-a lingvisto Detlev Blanke elkalkulis, ke la sola scienca branĉo, kie absolute superregas artefaritaj lingvoj, estas ĝuste la branĉo dediĉita al tiaspecaj lingvoj kaj najbaraj problemoj, do la interlingvistiko. Laŭ li, 60% de la interlingvistika literaturo estas publikigita en artefaritaj lingvoj, kaj el tiu amplekso – 95 % en Esperanto.

Tio signifas ne nur, ke artefaritaj lingvoj dominas en la scienca interlingvistika produktado, sed ankaŭ ke esperantologio dominas en interlingvistiko. Kaj siavice la “esperantologiaj eseoj” de G. Waringhien apartenas al tiu klasika prilingva verkaro, kiu dominas en esperantologio. Mi eĉ povus emfaze diri, ke la moderna esperantologio stabiligis kiel scienca disciplino precipe dank’ al la bazaj produktoj de Waringhien kaj lia “rondo” – PIV kaj PAG, al kiuj *Lingvo kaj vivo* rilatas kiel siaspeca enkonduko.

Antaŭ la preparo de tiu ĉi recenzo mi havis la eblecon trastudi la bibliotekon de UEA en Roterdamo. Tiu trastudo estis tre instrua. En la biblioteko la libroj estas ordigitaj ne laŭ aŭtoroj kaj titoloj, sed laŭ la jaroj de apero. Kaj ĝuste pro tio evidentiĝis stranga fenomeno. Interlingvistiko kaj esperantologio ekzistas jam plurajn jardekojn, sed la literaturo en tiuj esplorbranĉoj ne prezentas konstantan evolulinon. Estis jardekoj kiam ĝi entute malaperis el la libra merkato. Post la eksploda abundo de tiu literaturo en la jaroj de la Ido-krizo kaj post pli malfrua ekfloro en la dudekaj kaj fruaj tridekaj jaroj, ĝi dum longa periodo praktike ne prezentiĝis al la atento de legantoj, almenaŭ ne en Esperanto. Notinde estas ke la diskuto pri interlingvistiko dum la internaciaj kongresoj de lingvistoj en 1931 kaj 1946 estis iniciatita el la kampo de rivaloj de Esperanto: la unua iniciato venis de O. Jespersen, publikiginta en 1928 sian *Novial*, kaj la dua de A. Martinet, laboranta tiam pri la en 1951 aperonta *Interlingua*.

En 1959 *Lingvo kaj vivo* tial komencis ne nur la eldonserion “Movado” ĉe J. Régulo (La Laguna): ĝi fakte komencis novan etapon en la teoria priksidero de Esperanto, kiam la iniciato transiris al la esperantistoj mem. Kaj tia pionireca kvalito de la verko klarigas kelkajn el ĝiaj internaj trajtoj.

En la Preludo Waringhien aludas “la perfidon de la kleruloj” rilate al Esperanto – la fakton, ke ili, kaj inter ili precipe la lingvistoj, ignoras Esperanton, kvankam tiu unika lingva kreskaĵo aperis kaj evoluis antaŭ iliaj okuloj. La plendo estas ĝusta, aŭ pli precize, estis ĝusta fine de la 50-aj jaroj. Mi tamen atentigu, ke pri tio kulpis ne nur la lingvistoj. Kiamaniere ili interesiĝu pri Esperanto, se pri ĝi tiutempe povis atesti nur magraj broŝuroj kun mizera enhavo? La nuna literaturo pri Esperanto estas jam multe pli riĉa – kaj pli: ĝi estas profesinivela, do fake alloga al lingvistoj. La vojon al tiu fakismo siatempe montris la libro de Waringhien, per modele riĉa enhavo kaj brila stilo.

Pri kio temas en la libro? Post la Preludo venas tri ĉapitroj: “Nia lingvo”, “Niaj problemoj”, “Niaj perspektivoj”. En la unua aparte interesaj estas esploroj pri la genezo de Esperanto – la

lingvoprojektoj de Zamenhof el la jaroj 1878 kaj 1881. La parto pri la akuzativo en interlingvistiko kaj Esperanto sonas tamen tro apologiece kaj ne plene konvinke: se la akuzativo vere donas tiom da avantaĝoj al la lingvo, kiel kredas la aŭtoro, ne estas kompreneble, kial la ĉefaj eŭropaj lingvoj preferis perdi tiujn avantaĝojn dum sia evoluo.

La dua ĉapitro traktas la eternajn problemojn pri la landnomoj, la Esperanta pasivo, la neologismoj. Ĝuste ĉi tie montriĝas la prosperiga fakismo de la aŭtoro: kontraste al multaj teoriuloj de la dudekaj-tridekaj jaroj, kiuj rezonadis pri Esperanto pure apriorie, postulante, ekzemple, ke la landnomoj ĉiuj estu formataj per *-ujo*, Waringhien allasas elastan sistemon dependantan de la praktiko de uzantoj (fakte aplikante al Esperanto la saman metodon kiun oni aplikas al aliaj – “naturaj” – lingvoj).

En la lasta ĉapitro la leganto ĝuas fajnajn rimarkojn de Waringhien pri la lingvaj obstakloj en la internacia komunikado, konsideras kun li (ne ĉiam samopinianta) la interrilatojn inter Esperanto kaj ĝiaj konkurantoj, kaj refreŝigas en la memoro historian skizon de la Esperanto-movado.

Waringhien nomis la libron “sia testamento de esperantisto”. Sed samrajte ĝi povus nomiĝi: testamento de esperantismo.

Sergej Kuznecov (Sovetunio)

Signoj de kreskanta intereso

Bibliografio de universitataj kaj altlernejaj diplomverkoj, disertacioj kaj tezoj pri Esperanto kaj interlingvistiko. Edward Symoens. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo), 1989. 159p. 20cm. 27,00 gld.

La scienca interesiĝo pri la monda lingvo-problemo ĝenerale kaj aparte pri planlingvoj kaj Esperanto daŭre kreskas. Al tiu evoluo, plej rimarkebla dum la lastaj du jardekoj, respondas kreskanta kvanto de altlernejaj studoj, diplomlaboraĵoj, disertacioj. Kaj ĉiam denove, se profesoro volas doni al studento temon el la kampoj de interlingvistiko aŭ esperantologio, leviĝas la demando, ĉu jam ekzistas disertacio pri la sama temo. Serioza doktoriĝa disertacio, ekzemple, devas enhavi novajn ekkonojn aŭ almenaŭ prilabori ekzistantan materialon laŭ novaj kriterioj sur pli alta kvalita ŝtupo ol antaŭe farite. Sed de kie preni la informojn?

Jen, Edward Symoens, prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (ILEI) kaj estrarano de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), entreprenis ege temporaban kaj zorgopostulan taskon, kunmetante novan liston de altlernejaj materialoj. Kiel la kompilinto enkonduke atentigas, la listo “ne estas limigita al verkoj prilaboritaj en universitatoj, sed enhavas ankaŭ laboraĵojn en ne-universitataj, postduagradaj altlernejoj aŭ superaj institutoj, ekz. pedagogiaj, teknikaj, profesiaj, artaj, sociaj k.a., en kiuj la studentoj akiras fakan, profesion diplomon aŭ titolon” (p. 7). La enkonduko estas ne nur en Esperanto sed ankaŭ en la franca kaj angla. Same la “indekso laŭ aŭtoro, lando kaj titolo” estas trilingva, kio faras la verkon uzebla ankaŭ en akademiaj rondoj ekster la Esperanto-movado.

La indekso enhavas 122 pretajn verkojn kaj 10 titolojn, kiuj ĉe la redakta fino ankoraŭ ne estis finitaj aŭ defenditaj. Do informoj pri 132 titoloj. Sekvas indeksoj laŭtema, laŭdiploma,

laŭlanda kaj laŭ-data. La ĉefa parto de la bibliografio (p. 72-159) entenas pri ĉiu titolo bazajn informojn (nomo de la aŭtoro, adreso, originala titolo de la verko kaj Esperanta traduko, jaro de la prezento, amplekso, universitato kaj profesoroj, grado kaj titolo akiritaj, fonto de la informoj, kelklinia priskribo). Ne malofte Edward Symoens ne sukcesis akiri, malgraŭ multaj penoj, kompletajn informojn pri la listigitaj verkoj. Mankas jen indiko pri la fakultato, jen privata adreso, jen detaloj pri la enhavo, amplekso aŭ sciencaj ekspertizantoj.

Pri la monda lingvo-problemo ni trovas tre malmulte da materialoj, eble 8-10 titolojn. Pri problemoj de planlingvoj traktas ĉirkaŭ 15 titoloj. Ĉio alia rilatas al Esperanto kun diversaj aspektoj: bibliotekscienco, gazetaro, historio, informatiko, instruado, esperantologio kaj komparistiko, apliko, literaturo, religio k.a. Oni tamen devas konscii, ke la disertacioj listigitaj ne ĉiuj estas pure interlingvistaj/esperantologiaj. Ekzistas malgranda parto da ili, kiuj nur en certaj ĉapitroj iom traktas Esperanton (Sörgel) aŭ kiuj nur plurloke mencias ligojn al la Esperanto-movado tamen traktante tute alian temon (Lins). Tamen estis ĝuste, listigi ankaŭ ilin.

La unua doktoriĝa disertacio aperis (laŭ Stojan) en la jaro 1902 (ne 1906). De 1900-1945 entute aperis nur 7 disertacioj. De 1946-1975 aperis 23, kaj nur inter 1976-1980 aperis 34, inter 1981 kaj 1985 aperis eĉ 39. Inter 1986 kaj 1987 estis jam 17 listigitaj. Ĉar kelkaj estas preparataj, pri kiuj Symoens ankoraŭ ne havis informojn, de 1976-1990, entute estos eĉ ĉ. 120 disertacioj! Do, oni povas diri, ke ekde 1975 komenciĝas intensa agado sur la kampo de la studenta universitatnivela verkado. Tiu tendenco sendube daŭras.

Malgraŭ la diligenta klopodo de Symoens, subtenata de aro de aliaj kolegoj, la bibliografio estas mankhava. Do – necesas ne nur korekti la unuan eldonon, pri kio la aŭtoro ja petas, ankaŭ necesas daŭre informadi lin pri eventuale ankoraŭ nekonataj verkoj, preparataj aŭ baldaŭ defendotaj.

Ĉiukaze, neniuj serĉanto de taŭga temo por interlingvistika disertacio rajtas ignori tiun bibliografion. Edward Symoens faris treege gravan laboron, forte gratulindan.

Detlev Blanke (Germana DR)

La adreso de Edward Symoens troviĝas ĉe la interna front-kovrilo, en la koloŝono.

Relanĉo de dialogo kun la ĝenerala lingvoscienco

Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages. Div. aŭtoroj, red. Klaus Schubert (1954). Berlin/New York: Mouton de Gruyter, 1989. 348p. 23cm. Bind. Trends in Linguistics: Studies and Monographs 42. ISBN 0-89925-548-5. Nur anglalingva. 105,00 gld.

Kelkfoje ligiĝis seriozaj kontaktoj inter la ĝenerala lingvoscienco kaj la interlingvistiko. Memorinda estas la dana prof. Otto Jespersen (1860-1943), kiu plurloke en sia ĉefverko *The Philosophy of Grammar* [La filozofio de gramatiko] tute nature komparas kun planlingvoj. En 1948, la sesa Internacia Kongreso de lingvistoj en Parizo okazigis sekcion pri interlingvistiko. Sed krom tiaj epizodoj, la scienco pri planlingvoj ne rimarkeble aŭdigis sian voĉon en la lingvistiko.

La apero de *Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages* montras, ke larĝa kaj serioza intereso pri interlingvistiko nun malfermiĝas. La redaktisto Klaus Schubert klarigas la antaŭan silenton per tio, ke 60 elcentoj de la interlingvistika literaturo estas verkitaj en planlingvoj. Aliflanke,

Enhavo de *Interlinguistics*

Pri interlingvistiko kiel scienco (Schubert); Pri la studobjekto de interlingvistiko (Duliĉenko, D. Blanke, Kuznecov); Pri lingvoplanado (Maxwell, Lo Jacomo); Pri la evoluo kaj estetiko de Esperanto (Piron, Janton, Halvelik); Pri la socia kaj psika bazo de Esperanto (Piron, Pool/Grofman, Carlevaro); Pri la gramatiko de Esperanto (Daŝgupto, Schubert); Pri terminologio kaj Esperanto (W. Blanke, Eichholz, Sadler)

multaj lingvistoj opinias, ke interlingvistiko neeviteble havas nesciencan, preskriban karakteron: lingvistoj ne finis la priskribadon de la natura lingvo; kiel, do, interlingvisto povas pretendi konstrui lingvon surbaze de nekompletaj konoj?

La scienco de lingvistiko konsistas el tri stadioj de esploro: priskribo, klarigo kaj eventuale apliko. *Interlinguistics*, prezentante ekzemplojn de ĉiuj tri stadioj, tiel plenumas la kriteriojn de scienceco. Trajto, kiu trakuras la kontribuojn, estas, ke la aŭtoroj apogas sin sur la praktikaj spertoj kaj la ĝis nun maksimume uzata planlingvo, Esperanto. La artikolo de Maxwell aliflanke ebligas relanĉon de la teoria interlingvistika diskuto kaj de relativigo de la perfekteco de jam ekzistantaj planlingvoj. Pro sia *preskriba* kaj *aplika* karaktero, ĝi estas, kion mi komprenas per "interlingvistiko".

Vidinte la grandan parton de la artikoloj, kiu *priskribas* la interlingvistikan fenomenon Esperanto, mi tamen konsentas kun Kuznecov, ke la interlingvistiko ŝanĝiĝis de aplika al baza scienco. Pro tio mi dirus, ke hodiaŭ povas esti malfacile distingi esperantologion disde interlingvistiko.

La manko, kiu sentiĝas en la kompilaĵo, estas socilingvistika alpaŝo, malgraŭ tio, ke pluraj aŭtoroj tuŝas rilatajn demandojn. Oni povas konsenti, ekzemple, pri la kvanta metodo de Detlev Blanke, ke socilingvistikaj ŝtupoj markas la distancon inter planlingva projekto kaj vivanta planlingvo. Sed ankaŭ la naturajn lingvojn indas alpaŝi per kritikaj metodoj: la implicita konkludo en la kontribuo de Duliĉenko estas, ke la dana estas malpli natura lingvo ol la angla.

Pri *lingvoplanado* Lo Jacomo staras ĉe la tradicia ideo, ke lingva normigo kuntrenas malpermeson uzi tiun aŭ alian formon, kvankam oni ĝin komprenas. *Socilingvistika* lingvoplanado estas esplori, kiu varianto de lingvo estas la plej kovra kaj norma laŭ lingvistikaj kriterioj, kaj kiu varianta formo povas esti tolerata aŭ akceptita en la norma lingvo, dum la aliaj variantoj estas dialekta, socilekta ktp. En Danio, la socilingvistika lingvoplanado saldiĝas per ĝenerala utilo por ĉiuj. Lingvoplanado tiel difinas ankaŭ naturan lingvon, kriterio aldonebla al la sociolingvistika ŝtuparo de Detlev Blanke: la norma planlingvo povas esti filtrita per lingvoplanado.

La kompilaĵo estas atentoveka kontribuo al interlingvistiko, remalfermanta la sciencan dialogon.

Jan Sosniecki (Danio)

Kvazaŭ spekti mem la batalon

Kiel Esperanto venkis? kaj Konfliktoj inter esperantistoj. Kioto: Ludovikito, 1989. Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof, kajeroj 8bis kaj 9bis. 313 kaj 451p. 22cm. Po 48,00 gld.

Jen do du novaj volumoj el la fama, kaj ŝajne neelĉerpebla kolekto, kiun s-ro Itô dediĉis al la memorigo de Zamenhof. Ili

apartenas al la “bisaj” numeroj, t.e. ili entenas la dokumentojn, leterojn, artikolojn ktp, kiuj akompanis, apoge aŭ reage, la agadon de Zamenhof kaj estas necesaj por ĝin plene kompreni. Tia estis la historia perspektivo, kiun, jam en 1948, mi entreprenis disfaldi en la duvolumaj *Leteroj de Zamenhof*, kaj kiun sukcesis al mi aperigi dank’ al la aŭdaco de Lanti kaj la apogo de la SAT-anoj. Sed de tiu tempo, novaj dokumentoj estis retrovitaj (kelkajn mi publikigis kaj komentis en mia kvara eseero *1887 kaj la sekvo*); dume tiuj du kolektoj estis elĉerpitaj, kaj estis tempo prezenti al la publiko la rezulton de tiom da traserĉoj, en ĝisdatigita kaj science ordigita eldono. Jen kion ĵus faris amiko Itô per tiuj du, laŭ sia kutimo prestiĝaj, volumoj.

La unua, kies titolo memorigas pri la epokfara *Kial E-o venkis* de L. I. Ĵirkov (1931), entenas la ĉefajn pecojn de la Idokrizo (1907-8), kun aldono i.a. de serio de leteroj de Ostwald al Zamenhof, elterigitaj kaj el la germana tradukitaj de Haupenthal, kaj kun aldono de la plej trafaj artikoloj de Th. Cart (el lia *Lingvo Internacia*) kaj de la plej vervaj “Babiladoj” de C. Bourlet (el lia *La Revuo*).

La dua, kies titolo sufiĉus por resumi nian historion inter 1908 kaj 1911, remetas sub niajn okulojn la akrajn polemikojn inter la du partioj Cart-Bourlet, duelon, kiu fojfoje oponas Cart ankaŭ al Sebert kaj eĉ al Zamenhof. Tiele ni povas sekvi en iliaj buntaj epizodoj la tri konatajn “aferojn”: la Barcelona Kongreso, kun ĝia sufoka atmosfero venenita de la ĵusa kataluna ribelo (R. Lloancy disponigis al Itô detalan enketon pri la enigmoj de tiu kvina kongreso, preterlasante tamen unu: la atribuo de la ordeno de Izabela la Katolika al ano de gento, kiun kun ŝia aprobo la Inkvizicio sendis po miloj sur la ŝtiparojn), la vortaro Esperanto-franca de Grosjean-Maupin kaj la starigo de reprezentanta organizo.

Kio cetere donas al tiuj legaĵoj apartan vivecon, estas la fakto, ke, dank’ al moderna procedo de reprodukto, ĉiu dokumento estas prezentita en sia originala formo, kun la tipoj ĉu de *La Revuo*, ĉu de *Lingvo Internacia*, ĉu de SAT-eldonejo (kaj eble kelkaj miros, en ĉi lastaj, pri la ŝpariga uzado de “k” anstataŭ “kaj”). Oni tiele havas la impreson esti reŝovita en la antaŭmilitan periodon kaj kvazaŭ spekti mem la batalon.

Al la novaj – kaj la malnovaj (tiel malproksime svenas tiuj okazaĵoj!) esperantistoj, ĉi tiuj du volumoj alportos neanstataŭigeblajn atestojn pri nia pasintaĵo kaj malkovros al ili, je kiom da obstakloj – kaj ne ĉiuj el la ekstera mondo! – devis sin liberigi nia lingvo kaj nia movado!

G. Waringhien (Francio)

Ĉu vere sen rezisto?

La laborista Esperanto-movado en Hungario, 1913-1934. Zoltán Barna. El la hungara trad. Imre Szabó. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 185p. 18cm. 18,00 gld.

Jen valora kaj instrua verko, abunde dokumentita per riĉaj materialoj, nepre havinda por tiu, kiu studas la socialistan (laboristan) Esperanto-movadon. Sed ĝi ja postulas multon de la interesita leganto.

Ŝajnas al mi, ke la aŭtoro verkis por hungaroj aŭ por tiuj, kiuj estas pli-malpli informitaj pri la situacio en tiu lando. Do troviĝas multaj eroj nefacile kompreneblaj por eksterlandanoj, kiel mi. Ĉe la unua tralego mi sentis min erarvaginta en labirinton, kvankam la multaj notoj devus helpi la leganton. Mankis al mi fundamentaj scioj: nur Bela Kun, Evgenij Varga, György Lukács kaj aliaj aŭtoroj, la “133 tagoj” kaj la malfeliĉa evento en 1956 konsistigis la tuton de mia scio. Kiam la aŭtoro ekzemple diras:

“En oktobro 1914 estis 114 000 senlaboruloj, inter ili 100 000 budapeŝtaj laboristoj kaj dungitoj,” tiuj, kiel mi, kiuj neniom scias pri la tiutempaj laborkondiĉoj, povas malfacile kompreni la ciferojn. Eĉ kun la helpo de *Esperanto en perspektivo* kaj *Gvidlibro por supera ekzameno* mi povis apenaŭ kapti la ĝeneralan bildon, ĉar la priskribo foje dronis en detaloj kaj amaso da propraj nomoj.

La traduko, laŭ mia juĝo, havas plurloke difektojn. Mi devis kompreni, ke “laborista hejmo” povas esti “laborista domo”, dum kelkloke “hejmo” estas “sidejo” aŭ simila; ke “tial, ĉar” signifas simple “pro tio ke” aŭ “ĉar”; kaj la uzo de “ebli” ne kontentigis min. Pli grave, ĉe paĝo 103 troviĝas misaranĝo de kompostlinioj.

Kaj la plej granda dubo: ĉu neniu volis refondi la Hungarlandan Esperantistan Societon Laboristan, kiam la socialdemokrata partio decidis likvidi ĝin? Nekredeble! Kaj ĉu la Hungara Komunista Partio havis ian programon por la Esperanto-movado entute, ekster la ĝenerala opozicia taktiko? Mi deziras scii.

Mi metis kelkajn plendojn, ĉar la verko estas tre valora por nia historio. Cetere oni atentu, ke ĝi estis verkita jam antaŭ la lanĉo de perestrojko!

Miyamoto Masao
(forpasinta la 12-an de junio en Japanio)

Miriga abundeco de opinioj kaj problemoj

Akademias Studoj 1987. Red. R. Eichholz. Bailieboro: Esperanto Press, 1988. 157 + 203p. 29cm. 42,90 gld.

La unua frazo de la Akademias Studoj (A.S.) 1987 jam estas bonega kaj komencu tiun ĉi recenzon: Propra opinio ne estas leĝo por alia.

La A.S. estas grava opiniinterŝanĝilo de nia movado. Ĝi klare montras, ke la Akademio ne volas izoliĝi sed daŭre realigi fortajn kontaktojn al la vivanta lingvo. Estas ne facile obei la lingvouzon, diskuti kiel eble plej multajn opiniojn kaj samtempe estingi kontraŭ-Fundamentajn, devojiĝajn tendencojn kaj trovi la taŭgan.

La temoskalo estas vastega, oni kompreneble ankaŭ renkontas “ĉiamajn problemojn”: ata/ita, vir/iĉ/un, eĉ kompletajn ŝanĝojn (ĉi-foje “Totala Esperanto”). Kelkaj proponoj certe estas mortnaskitaj. Tamen – diskuti ne estas malpermesite. Kaj tiun demokratian principon bone subtenas la A.S.

Kelkaj kontribuoj estu elstarigitaj.

Tre interesaj estas la klarigoj pri alfabetoj, kiujn verkis d-ro Albault. La detala artikolo traktas ilian historion, sontrezoron kaj situon. En la klare komprenebla teksto min ĝenas nur la oftaj nonoismoj (radikoj kun duoblaj konsonantoj), ekz. Helleno, Gallo, Cirillo, gamma, kappa (Heleno, Gaŭlo, Cirilo, gama, kapa).

La komentoj de ĉino, nome s-ro Xie Yu-ming, pri la A.S. 1986 brile montras multon: la ĥaoson pro la ne-Esperantaj propraj lingvaĵoj de Piĉ, de Diego aŭ similaj, la neceson ne neglekti la azianojn en Esperanto, la ŝancon de Esperanto esti tutmonda malgraŭ tipe eŭropa strukturo – pro la nevenkebla facileco.

Esperanton por sciencoj kaj nomenklatureoj traktas pluraj kontribuoj. Jen seriozaj akceptindaj proponoj, jen evidentaj sensencaĵoj (ekz. enkonduko de literoj w, y aŭ de sufiksoj ev, om, im, kwo, slu, vwa, ij). Multe da laboro por la Akademio.

Ke ne sufiĉe diskutite restas problemriĉaj lingveroj, montras la artikolo “Grafoj kaj grafioj – ĉu ordo eblas?”. Bertil Wengergren bone listigas kaj diskutas la diversecon de tiuj vortpartoj – kaj la tialajn malfacilaĵojn. Finiĝas lia kontribuo per 18 eksplikitaj modifopropoj. Bonega solvo mi persone opinias ekzemple la (vaste konatajn kaj internaciajn) mallongigojn kino, porno, foto, steno.

Aliaj nepre menciindaj artikoloj temas pri la landnomoj. La atenta leganto ekscias, ke tiu problemo estas multe pli kompleksa, ol simple “lando-landano/homo-homujo” aŭ la diskuto -ujo/-io.

Bedaŭrindaĵoj de A.S. 1987 estas laŭ mi la jenaj:

- a) kelkaj artikoloj estas ĝene interrompitaj de aliaj;
- b) eble pro lia redaktisteco aperas tre (tro?) multe da kontribuoj de s-ro Eichholz pri komputoroj kaj Pekoteko;
- c) 203 paĝojn ampleksas la (certe laŭ ne nur mi forĵetenda) Parto III de “Lingvonormiga Reformo de Esperanto” fare de Manuel Halvelik, dum al la resto de A.S. 1987 sufiĉas 156 paĝoj.

Malgraŭ ĉia ajn opinia malsameco, unu konkludon certe ĉiu havas leginte A.S.: Esperanto estas vivanta.

Claus J. Güntel (Rejnlando/FR Germanio)

Konvena nur por komputilo

Sur la vojoj de la Analiza Skolo: Esperantologia esearo. Rikardo Ŝulco. Paderborno: Esperanto-Centro, 1987. 279p. 21cm. 39,90 gld.

Ĉiu vera esperantisto (ne temas pri la eternaj komencantoj) frue aŭ malfrue nepre alfrontas problemon de lingvouzo kaj stilo. La demando estas samaĝa kiel Esperanto mem: kio estas (estu) normo? Ĉi-teme estas verkita abunda literaturo. Eblas kompili liston de famaj nomoj ekde K. Bein ĝis K. Piĉ, kaj multe pli longan liston de librotitoloj.

Jen ankoraŭ unu libro el tiu stoko.

La pozicion de la Analiza Skolo eblas kelkfaze resumi jene: “En la lingvo internacia oni devas obei sole nur la logikon” (Z.), ĉar la logiko estas komuna al ĉiuj homoj kaj ĝiaj decidoj estas devigaj. Netuŝebla bazo de Esperanto estas la 16 reguloj kaj la Universala Vortaro; ĉiuj ceteraj verkoj de Zamenhof estas nur aplikoj de tiu bazo kaj ne malofte “enhavas deflankiĝojn de la lingva kodo, malĝustaĵojn ne konformigeblajn al ĝi”. La tutan Esperanton eblas elkalkuli el tiu “kodo”, uzante nur la logikon. La aktuala lingvouzo pravas nenion, kaj tio, kio kontraŭas la 16 regulojn, estas forĵetenda. Se oni evoluigos Esperanton laŭ aliaj principoj, tio nepre ĥaosigos kaj pereigos la lingvon. Do, la natura evoluo de parola lingvo estas, laŭ Ŝulco, degenero. Duvorte: Esperanto minacata! Danĝera paŝo! Piĝiniĝo! Tiaj kaj similaj timigaj vortoj abundas. Kiom ofte ni jam aŭdis similajn eksklamojn.

La negranda libro enhavas dek ĉapitrojn, dividitajn je multaj subĉapitroj. Ĉiu pritraktas apartan temon kaj fakte ne estas ligita kun la aliaj, sed komuna ideo certe obsedas ĉion. Atenta legado povas eĉ kaŭzi kapdoloron. Palavremo, multfoja ripeto de samaj vortoj kaj esprimoj lulas la menson. Por ilustrati ĉiun apartan ideon Ŝulco citas po 20 (foje eĉ 100) ekzemplojn de “malbonaj” frazoj, inter kiuj ofte mankas principa diferenco.

Inter la Ŝulcaj ideoj troveblas tamen multaj tute pravaj. Tio estas, interalie, uzo de “tiom” anstataŭ “tiel” por indiki gradon; neuzo de “unu” kiel nedifina artikolo; neuzo de superflua neologismoj. Tute prave Ŝulco pledas kontraŭ la lltisa manifestado, kontraŭ la piĉismoj. Li pravas, ke “plibonigi” Esperanton

celas nur tiu, kiu ĝin malbone posedas. “Esperanto nur mal-multe estas afero por la aktualaj esperantistoj. Ĝi multe pli estas afero por la estonteco de la homaro...”

Tre ofte tamen Ŝulco kontraŭas la Fundamenton, la komunan logikon kaj eĉ sin mem. Li prave oponas la aspektismon, sed diferencigas agadon kaj estadon kiel malsamajn aspektojn de la vivo, do malpermesas formojn kiel “legeblas”, “plenas” k.s. Li skribas: “same kiel la vivo, ankaŭ la lingvo verŝajne ne estas centprocente raciigebla. Restas vasta regno de libero”, kaj tuj malpermesas tute klarajn kaj kutimajn vortojn, nekonformajn al liaj reguloj: *fiŝkapti*, *partopreni*, *voĉdoni*, *kapbalanci*. Li plendas kontraŭ la piĉismoj, sed mem uzas nemotivitajn neologismojn (*vehementa*, *maĵorio*, *vigilo*) kaj eĉ ne glosas! Konstanta uzado de komplikaj verboformoj (“estas leginta”) kaj superflua afiksoj (“Renversatiĝos”) apenaŭ precizigas, sed tre pezigas lian stilon. Se li estas tiom fervora adepto de la 16 reguloj, kial li neglektas la principon de neceso kaj sufiĉo?

Kelkaj principoj kaj proponoj de Ŝulco faras lian lingvaĵon nenatura kaj aspektas ridinde – ekzemple, lia obstina esperantigo de propraj nomoj, kiuj iĝas monstroj kaj nerepreneblaj. Ĉu vi ŝatas verkojn de grafo Ljefo Talstoj? Aŭ vi preferas Johanon Wolfgangon Degojton aŭ Honoraton Debalzakon? Feliĉe, li ne kuraĝis esperantigi ĉinajn nomojn en la plej granda ĉapitro pri *El popola Ĉinio*... Eblas plu citi kaj analizi, sed mi ne volas simili Ŝulcon per harfendado kaj palavro.

Do mi resumas. La libro de R. Ŝulco certe ne estas senvalora, kvankam al neharditaj komencantoj ĝi povus kaŭzi mensan maldigeston. Tamen... Se ni sekvus lian vojon – ĉu Esperanto restus viva lingvo? Jes, ĉiuj homoj havas komunan logikon, sed tiu ja estas logiko *homa*. Ŝulco pledas por absoluta logiko, kiu konvenas eble nur por komputilo. Jes, la komputilo neniam eraras, sed la homa pensmaniero kompanse ebligas trovi solvojn por taskoj, kiuj ne estas konitaj antaŭe kaj malhavas iun teorion. La Ŝulcaj rekomendoj povus esti tre utilaj, ekzemple, por DLT, kiel stabila kaj unusignifa kodo – sed la homoj uzu lingvon konforman al sia pensmaniero.

Valentin Melnikov (Sovetunio)

Teknike, ne poete lerta

Esperanta rimvortaro. Jonathan Cooley. Egham: Codex Press, 1987. 79p. 21cm. 18,00 gld.

La Esperanta Rimvortaro estas bona ekzemplo de komputila tekstoprilaboro. Certe kiel baza fonto estas uzita la *Plena Ilustrita Vortaro*, malgraŭ ke tiu fakto nenie estas menciita. Preskaŭ 20 000 vortoj estas aranĝitaj en listoj laŭ la akcentita vokalo kaj la sonoj, kiuj sekvas ĝin. En ĉiu aparta listo la vortoj troviĝas en ordinara alfabetordo.

Se ni deziras havi plenan imagon pri tiu rimvortaro, ni devas kompari ĝin kun tiu de G. Waringhien kaj R. Bernard, jam ekzistanta de kelkaj jardekoj (ĝi estas parto de *Parnasa Gvidlibro*). Kaj ni tuj devas mencii la avantaĝojn de la lasta, kiuj samtempe estas mankoj de la nova rimvortaro. En la Rimaro de *Parnasa Gvidlibro* krom la rimoj estas prezentitaj ankaŭ rimidoj, kio estas tre utila kaj oportuna por homoj, verkantaj poeziaĵojn. La vortoj listiĝas en kolumnoj, kio ebligas pli facilan legadon. En la nova Rimvortaro mankas iuj ajn gramatikaj indikoj ĉe la vortoj.

Do, avantaĝojn por la poetoj la nova rimvortaro ne havas, tamen ĝi povas esti tre utila por lingvistikaj esploroj de Esperanto.

Kiril Velkov (Bulgario)

Laste aperis...

100 jaroj da kantado en Esperanto. Komp. Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1989. 204p. 21cm. 140 kantoj kun muziknotoj: instru-celaj, popolaj el diversaj landoj, indiĝene Esperantaj. 16,50 gld.

Aventuro kun Esperanto. Edward Malewicz. Warszawa: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1989. 181p. 19cm. Lernolibro por pollingvanoj. 12,00 gld.

Biblioteka terminaro. Esperanta, angla, ĉina, franca, germana, hispana. Doug Portmann kaj Koralo. Ĉinio: Eldonejo de Akademioj Revuoj, 1989. 239p. ISBN 7-80045-498-3. 18cm. Bindita. Nacilingvaj ekvivalentoj (kutime nur po unu por ĉiu lingvo), foje kun pli ampleksa difino, por pli ol 1200 alfabeto ordigitaj Esperantaj terminoj, kun indeksoj por la aliaj lingvoj. Inkluzivas terminojn en la fakoj informscienco, eldonado, presarto kaj dokumentado. 27,00 gld.

Comunicazione internazionale tra politica e glottodidattica, La. L'esperanto, cento anni dopo. Div. aŭtoroj, red. Andrea Chiti-Batelli. Milano: Marzorati, 1987. 189p. 24cm. Eseo pri la politika kaj lingvo-instrua signifo de Esperanto. 34,20 gld.

Defendo de la libro pri la Triunuo (1410). Johano Hus (1370-1415). El la latina trad. Gerrit Berveling. Breda: VoKo, 1989. 18p. 21cm. Voĉoj Kristanaj 18. Argumento kontraŭ la bruligo de neortodoksaj verkoj fare de la katolika eklezio. 3,00 gld.

Didaktikaj lingvaj ludoj. Aleksandr Fjodorov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1985. 93p. 21cm. Pli ol 150 ideoj por lude ekzercis lingvoscion. 11,70 gld.

Domaĉo, La. Petro Anselmo. Paderborno: Esperanto-Centro Paderborno, 1989. 24p. ISBN 3-922570-57-7. 21cm. Infana krimrakonto. 7,50 gld.

El la klasika periodo de Esperanto: Grabowski kaj Kabe (1937). Julius Glück. Vieno: Pro Esperanto, 1989 (represo). 36p. 21cm. Literatura eseeto. 7,20 gld.

Esenco de la Analiza Skolo, La. Rikardo Ŝulco. Paderborno: Esperanto-Centro Paderborno, 1988. 11p. ISBN 3-922570-56-9. 21cm. Argumento por logikisma aliro al la Esperanta normo. 4,80 gld.

Esperanto aus der Sicht eines Schriftstellers. Claude Piron. Wien: Pro Esperanto, 1989. 19p. 21cm. 5,40 gld.

Esperanto-Schnell-Kurs (1983). Hans Koch. Reviziis Stefan Maul. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1989 (2-a eld.). 85p. ISBN 90 71205 28 2. 15cm. 6,60 gld.

Esperanto: Manuale della lingua internazionale. Corso elementare. R. Imbert k.a. El Esperanto trad. E. Cordovaro k.a. Milano: CoEdEs, 1986. 78p. 21cm. Lernolibro laŭ la Zagreba metodo. 12,90 gld.

Inter senlaboreco kaj inflacio. Priskribo de la konjunkturpolitiko. Werner Bormann. Hamburgo (neindikita): la aŭtoro, 1989. 58p. 21cm. Studhelpilo, kun utilaj terminologiaj komentoj. 6,60 gld.

Interlinguistica Tartuensis VI. Obŝaja interlingvistika i planovye jazyki. Div. aŭtoroj, red. Aleksandr Duliĉenko. Tartu: Tartuskij Gosudarstvennyj Universitet, 1989. 183p. ISSN 0494-7304 0234-7911. 21cm. Precipe ruslingvaj artikoloj pri interlingvistiko kaj esperantologio. 15,00 gld.

Inversa Vortaro de Esperanto. Bernhard Pabst. Paderborno: Esperanto-Centro Paderborno, 1989. 22+91p. ISBN 3-922570-59-3. 21cm. Ĉiuj kapvortoj el *Plena ilustrita vortaro kaj Esperanta bildvortaro*, alfabeto ordigitaj laŭ inversa sinsekvo de literoj ekde la lasta de la radiko. Uzebla kiel rimvortaro aŭ ilo por leksikaj studoj. 22,50 gld.

Japanaj vintraj fabeloj. Miyamoto Masao (1913-1989). Parizo: SAT, 1989. 153p. 18cm. Rakontetoj, poemoj, eseoj el la okdekaj jaroj pri politikaj kaj Esperantaj temoj. 17,10 gld.

Jugistoj-Rut. La Zamenhofa teksto de la Malnova Testamento. D.B. Gregor. Coatbridge: Kardo, 1989. 23p. 21cm. Detala studo pri dubaj lokoj en la tajposkripto. 3,00 gld.

Sed nur fragmento. Trevor Steele. Chapecó: Fonto, 1987. 448p. 21cm. Bind. Biografia romano pri rusa antropologo en Suda Pacifiko fine de la 19-a jarcento. Facile legebla rekreo de la lasta stadio de la koloniisma epoko, kiu enplektas ankaŭ prisciencon kaj prireligian filozofion. 48,00 gld.

DIVERSAĴOJ

Esperanto-flago. Wilrijk: Sonorilo, 1989. 150x96cm. Nilona, kun ligŝnuro. 75,60 gld.

Filatelajo Bulgario: Poŝtmarko "50 jaroj de Bulgara Esperanto-Asocio", 1957. 3,00 gld.

Filatelajo Bulgario: Poŝtmarko "Zamenhof aŭtoro de Esperanto", 1959. 3,00 gld.

Filatelajo Koreujo: Unuataga koverto "Ekspozicio de Esperanto-filatelajoj" (1988). Markita kaj afrankita. 4,50 gld.

Filatelajo Kubo: Unuataga koverto "Konferenco Esperanto '88". Markita, afrankita. 3,00 gld.

Gluafiŝeto granda: "Eur+Esperanto". Wemmel: Esperurop, 1989. 75x85mm. Oro sur bluo. La 12 steloj de Eŭropa Komunumo ĉirkaŭ la jubilea E-simbolo. 1,80 gld.

Gluafiŝeto malgranda: "Eur+Esperanto". Wemmel: Esperurop, 1989. 50x60mm. Oro sur bluo. La 12 steloj de Eŭropa Komunumo ĉirkaŭ la jubilea E-simbolo. 1,20 gld.

Gluetikedaro: "Mi amas Esperanto-n". Tokio: Tokia Esperanto-Kooperativo, 1989. Diametroj dufoje 4cm, 20-foje 2cm. Blua, ruĝa, verda sur blanka fono. 1,20 gld.



Glumarko: 75-a UK, Havano. Roterdamo: UEA, 1989. 3x6cm. Kongresa simbolo en ruĝo, bluo, blanko, sur verda insulo kun helblua fono; blankaj literoj. Folio de dek markoj: 2,40 gld. Triona rabato ekde 30 folioj (300 markoj).

Insigno: "Mi amas Esperanto-n". Tokio: Tokia Esperanto-Kooperativo, 1989. Diametro 4cm. Blua, ruĝa, verda sur blanka fono. 3,00 gld.

Insigno ovala: Jubilea simbolo. Eldonis Flandra Esperanto-Ligo. 6x10mm. Blanka, verda kaj ora. 2,40 gld.

Kasedo: Bristolokantas. Div. komponistoj, tradukis Norman Lock k.a., kantas Helen Lloyd, William Pepper kaj Margaret Small. Piana akompano de Hazel Wickham. Bristol: la artistoj, 1989. Kun tekstofolio. Operaj, folkloraj kaj modernaj kantoj. 20,10 gld.

Kreito. Luda lingva konkuro. Ges-roj Nehéz, István Hegyi. Veszprém: Pannon/Hungara Esperanto-Asocio, 1989. 770 vortokartoj, 87 afiŝokartoj, 200 ĵetonkartoj, instrukci-libreto, pakitaj en skatolo 21x15x5cm. Bazaj materialoj por diversaj lingvoinstruaj ludoj, precipe koncerne la formadon de frazoj. 28,50 gld.

Lumbilda kompleto: Internacia Ekspozicio de UEA. Rotterdam, 1989. 36 fotoj de la panela kompleto, montrantaj diversajn aspektojn de la movado. Kun gvidlibreto. 84,00 gld.

Poŝtkartserio "Monumentoj pri Esperanto en Nederlando". Lelystad: D. Goslinga, 1989. Kvin eroj (Bergen op Zoom, Leeuwarden, Utrecht, Vlieland, Zwolle). 2,40 gld.

Sondisko: La Esperanto-knabino. Komponis Tarallo/Silfer, kantas Nikolin'. Svislando: LF-koop, 1989. 17,5cm. 14 minutoj. Kun tekstofolio. Tri lirikecaj kantoj, tiu de la titolo ankaŭ en franca versio. 15,00 gld.

Ŝlosilringo: 75-a UK, Havano. Medaliono kun duflanka reliefo. 5,10 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Freŝa vento

Plej koran kaj varman gratulon pro la septembra numero! Estas jam tempo nomi amatoraĵon amatoraĵo, fuŝaĵon fuŝaĵo kaj blekiston (p. 152) blekisto! Ĝenerale, mi plene aprobas la venton de honesta kritiko, kiu jam de iom da tempo blovas tra viaj paĝoj. Eĉ se iuj bovoj estas kornopikataj, kuraĝe daŭrigu en tiu ĉi vojo!

Angelos Tsirimokos (Belgio)

Survoje al dek mil...

Via membrokampanjo (por dek mil post tri jaroj) estas subteninda. Koincidas novaj prezidanto, estraranoj kaj atmosfero. Bonvole konstatu, ke la UEA-organo estas entuziasme legata tra la mondo.

Osaki Kazuo (Japanio)

Reage al la alvoko en la oktobra numero, mi jam aligis du netranspagipovajn esperantistojn al UEA (ambaŭ MJ), kaj krome pagas por ĉina korespondamiko la abonon al tiu ĉi revuo.

Pro tio kaj pro la menciita kampanjo mi prenis la martan numeron de tiu ĉi

jaro, por iom esplori la membrostatistikon. El tio evidentiĝis ke en okcidenta Eŭropo, norda Ameriko kaj Aŭstralio/Novzelando troviĝas ĉ. 5 000 (jes, kvin mil) individuaj membroj de UEA.

Se ĉiu okcidentulo membrigus nur unu netranspagipovan konaton al UEA, kio kostos nur maksimume 25 gld. por MJ, ni do havus en tre mallonga tempo eĉ multe pli ol la nun dezirataj dekmil individuaj membroj!

Rob Keetlaer (Nederlando)

Pli bone iam ol neniam

Mi ĵus finlegis la artikolon "UEA forlasis nin" el oktobro, p. 164-5. Unue mi gratulu la verkinton, kaj poste la revuon, kiu "kuraĝis" aperigi tian materialon. Jarojn antaŭe estis jam tempo aperigi tian artikolon, sed pro sia neŭtraleco (ĉu?) UEA rifuzis diskonigi la veron pri la situacio de rumaniaj esperantistoj, spite la informojn, kiujn ĝi ricevis tiutempe; nek prenis ian decidon rilate tiun situacion.... Finfine, ĉi-jare UEA decidis preni kelkajn mezurojn [fari ion]. Estas ja la 24-a horo, sed pli bone iam ol neniam.

Mi ŝatus aldoni kelkajn spertojn miajn.... Decembre 1983 mi organizis, en la distrikta biblioteko de urbo Cluj-Napoca, E-ekspozicion.... Post la fermo... oni alvokis min al la Distrikta Komitato por Edukado, kie oni demandis min pri Esperanto, kaj kie oni antaŭanoncis, ke la ekzisto de la Kluĵa E-klubo estas endanĝerigita pro la "tro granda nombro de nerumanaj membroj". Oni proponis al mi forigi "ĉiujn nerumanojn" el tiu klubo, kies sekretario mi estis, kaj "ni garantias ĝian daŭran ekziston". Kompreneble, mi rifuzis tion, kaj sekve, sen ĉesigi la klubon, oni unue ĉesigis la E-kursojn funkciajn enkadre de la klubo kaj ĉe la Popola Universitato. Post kelkaj monatoj, invokante la trouzon de elektro kaj gaso, oni malpermesis la uzadon de la ĉambro, en kiu la kluĵaj esperantistoj renkontiĝis dum pluraj jaroj. Interese estas, ke ĉiuj aliaj kluboj funkciajn sub la sama egido (de la Urba Kulturdomo) daŭrigis sen-probleme sian agadon....

Sed... oni ne povas mortpafi ideon. Kaj milojn da rumanoj jam trafis la ideo de Esperanto. Ili agetas (kaŝe) kaj esperas ke ankaŭ Rumanio konos post nelonge la ŝanĝojn, kiuj okazas en orienta Eŭropo. Jam temp' està!

Ionel Onet (Rumanio/Usono)


Loke

• **Aŭstralio:** La Asocio por Unuiĝintaj Nacioj de Okcidenta Aŭstralio okazigis seminarion pri Esperanto la 2-an de septembro 1989 en la Universitato de Okcidenta Aŭstralio. Parolis John Mills, Anne Jeavons, Vera Payne kaj Donald Broadribb, kies referaĵoj poste aperis en la revuo de la asocio. La organizaĵo havas por-Esperantan politikon.

• **Aŭstrio:** La nacia biblioteko gastigis ekspozicion "Edmond Privat: esperantisto kaj teoriisto de la federigo de Eŭropo" de la 7-a ĝis la 30-a de novembro. La ekspozicion realigis la svisa interlingvistika centro CDELI kaj Internacia E-Muzeo en Vieno. Kiel malfermon oni aranĝis dutagan kolokvon pri Esperanto, al kiu kontribuis ankaŭ du nemovadaj terminologoj el Vieno.

• **Belgio:** UEA-estrarano Grégoire Maertens parolis pri Esperanto ĉe la malfermo de librofoiro en Antverpeno, la 1-an de novembro 1989. Eldonejo kaj Librejo Sonorilo prizorgis standon dum la 12 tagoj de la aranĝo.

• **Brazilo:** Ĉirkaŭ 260 homoj partoprenis la 25-an Brazilan Kongreson, de la 10-a ĝis la 14-a de aŭgusto en Campo Grande (Suda Mato-Groso). Kunsidante en la plej granda natura rezervejo en la mondo, la kongresanoj diskutis pri "Ekologio kaj Esperanto: Kiel marŝi duope?". Inter la artaj prezentoj estis koncerto de Flavia Fonseca, teatraĵo, koruso kaj klasika koncerto. La nova prezidanto de BEL fariĝis parlamentano José Lins Albuquerque, prezidinto de LKK por la 66-a UK en Brasília.



• **Eŭropa Komunumo:** E-klubo "La Konko" en Oostende, Belgio lanĉas "eŭropan premgrupon" sub la nomo Eŭropa Manpremo, celante kolekti subskribitajn deklarojn favore al la disvastigo de Esperanto apud la naciaj lingvoj kiel

"rimedo por nediskriminacia komunikado". Adreso de la klubo: Paul Michiels-laan 10, B-8400 Oostende.

La 14-an de oktobro unuafoje okazis kunordigitaj manifestacioj de esperantistoj antaŭ la sidejoj de la nacia televido en tri eŭropaj landoj. En Romo 21 homoj, en Parizo 90, kaj tria grupo en Dublino postulis publikan debaton pri la eŭropa lingva problemoj kaj ŝancoj solvi ĝin. Por la 13-a de oktobro 1990 kunordigas: A. Menabene, Via Monti Sibillini, 3, I-00141 Roma, Italio.

Brita E-Asocio dissendis en novembro flugfolion al ĉiu brita parlamentano, kun la devizo: "Ni kapablas tion. Kial ne vi?" – aludante, kompreneble, al la solvo de lingvaj problemoj per Esperanto.

• **Filipinio:** La usona novaĵrevuo *Time* raportis en aŭgusto, ke la indiĝena filipina (aŭ tagaloga) lingvo ektransprenas la prestiĝan rolon de la angla kiel nacia liglingvo. En la pasintaj tri jaroj populariĝis filipin-lingvaj televidelsendoj kaj periodaĵoj, la nacia universitato transiris al la lingvo, kaj gravaj politikistoj

devis reiri al kursoj por plibonigi sian parolkapablon.

- **Germana DR:** Grupo de junaj berlinaj esperantistoj organizas parton de alternativa sekcio en la Festivalo de Politika Kanto, februaron 1990. Ideojn, proponojn pri ludoj kiuj rilatas al la temo "Eksterlandanoj" sendu al Cathrin Rollberg, Wilhelm-Stolze-Str. 27, DDR-1034 Berlin.

- **Japanio:** Inter la 4-a kaj 6-a de aŭgusto okazis la 8-a Komuna E-Seminario inter Korea kaj Japana Junularoj en urbo Ĉigasaki. 118 gejunuloj – egale dividitaj laŭlande – diskutis pri diversaj aspektoj de la ĉeftemo "Koreoj kaj japanoj, kiel ni memkreskas?" Estis ankaŭ fakaj kunsidoj kaj vespera programo, kun pupteatraĵo de "Espera Mondo" kaj kantistino Akiko Tanaka. Leviĝis la demando, ĉu kreskigi la ĉiujaran seminarion al pli vasta Azia Junulara Kongreso.

- **Jugoslavio:** De la 9-a ĝis la 12-a de oktobro Internacia Kultura Servo aranĝis la Tagojn de Tibor Sekelj, memore al la granda E-pioniro, esploristo kaj verkisto kiu mortis antaŭ unu jaro. Pli ol 200 homoj, ne nur esperantistoj, partoprenis la kvartagan aranĝon.

La ĉefa Zagreba muzeo-galerio, "Muzejski prostor", eldonis Esperantan gvidfolion pri sia ekspozicio "La brilo de ukrainaj trezoroj", kiu okazis de la 14-a de septembro ĝis la 1-a de decembro.

- **Katalunio:** La 24-a Kataluna Kongreso okazis sur franca tero, en Perpinyà, de la 8-a ĝis la 11-a de septembro. Gastparolis Claude Piron, Pierre Janton kaj Giorgio Silfer, antaŭ ĉ. 150 homoj. Ĉiuj kongresanoj ricevis ankaŭ tradukitan poemaron de la kataluna poeto Salvador Espriu. En la 29-aj Internaciaj Floraj Ludoj, kvar premiojn gajnis brita poetino Kris Ungar – laŭreato ankaŭ de la Belartaj Konkursoj 1989.

- **Togolando:** Denove ekde la 7-a de oktobro kunvenas ĉiusabate la Studgrupo Esperanta kaj Matematika (SEM), en la liceo de Gbenyedzikope. Post pozitivaj rezultoj el la unua provo, la nombro de grupanoj plu kreskas. Bezonataj estas franclingvaj matematikaj lernolibroj por la tria gimnazia klaso, skribmaterialoj, la E-lernolibro *Nouveau Cours d'Espéranto* kaj vortaroj. Sendu al Gbeglo Koffi, BP 13169, Lomé.

Unuiĝo Togolanda por Esperanto eldonis skizon pri sia kvinjara historio, kiu donas interesan bildon pri la fulmrapida ekesto de memstara movado en Afriko. Ĝia membro Kossi Logossou

aperigis aron da etaj skizoj kaj rakontoj pri la togolanda vivo sub la titolo "Folietoj". Ambaŭ eldonaĵoj mendeblas kontraŭ laŭvola donaco al la Fondaĵo Afriko ĉe la CO.

- **Ukrainio:** Okaze de la 175-a datreveno de la naskiĝo de Taras H. Ŝevĉenko, renoma ukraina poeto kaj pentristo, la eldonejo "Naukova dumka" aperigis libron de 150 tradukoj de unu lia poemo, "Testamento". Krom Esperanta traduko fare de Nadija Andrianova-Hordijenko, kvar nacilingvaj tradukoj – en la irlanda,

gaela, kimra kaj malta – estas faritaj per uzo de Esperanto kiel pontlingvo.

- **Venezuelo:** Esperanto-monumento en Maracaibo estis inaŭgurita fine de aŭgusto, en ĉeesto de la urbestro, gazetaro, televido kaj radio. Foton kontraŭ 6 irk sendas David G. Valecillos, Calle 79, n-ro 3C-72, Maracaibo 4002.

En la prestiĝa lingvista revuo *Boletín de linguística* prof. Jorge C. Mosonyi aperigis detalan artikolon pri la atingoj kaj perspektivoj de Esperanto kiel internacia lingvo.

Fake

- **Bahaismo:** La membraro de Bahaa E-Ligo duobligis en la pasintaj tri jaroj; ĝi nun havas membrojn en 50 landoj, inkluzive de pluraj sen forta E-movado.

- **Ekologio:** La franca grupo "Ekologio kaj Esperanto" prizorgis budon en granda ekologia foiro en Parizo de la 4-a ĝis la 12-a de novembro. Laŭ ĝia gvidanto Emilo Mas, bonaj kontaktoj dum la foiro helpis atingi, ke la franca verdula partio en sia jarkongreso la 18-an kaj 19-an de novembro alprenis rezolucion favore al la uzo de Esperanto en siaj internaciaj kontaktoj. Por kune studi kiel kunlabori, skribu al Emilo Mas, 38 rue Jean Moulin, F-33220 Ste Foy La Grande; aŭ rekte al AVUE, La Rivière, F-71 340 Saint Bonnet de Gray.

- **EXPO '92:** La Universala Ekspozicio de 1992, en la hispana urbo Seviljo, uzas Esperanton kiel unu el siaj informaj lingvoj. Por detaloj pri la Ekspozicio skribu al Manuel Moraleda, Departemento pri Propagando, EXPO '92, Recinto de La Cartuja, E-41010 Sevilla.

- **Fervojistoj:** Laŭ raporto en *Internacia fervojisto*, la 21 landaj asocioj de IFEF havis en 1988 entute 5103 membrojn, el kiuj 2103 estis individuaj membroj de IFEF. El tiuj lastaj, duono estas emerituloj, kvarono estas sub la aĝo de 30 jaroj. 16 landaj asocioj eldonas propran revuon. La plimulto raportas bonajn rilatojn kun la landa fervoja administracio, la landa FISAIC-sekcio kaj/aŭ la sindikatoj, kiuj en iuj kazoj subvencias la E-asocion. Malgraŭ tio pluraj asocioj maltrankviliĝas pri sia kapablo allogi junajn membrojn.

- **Instruistoj:** Por la unua fojo, Esperantobudo estis prezentita kadre de la jarkongreso de la franca asocio por instruistoj en antaŭelementaj lernejoj, junion 1989. Sub la devizo "Mondcivitano ekde la antaŭelementa lernejo", la budanoj (kiel UEA-delegito Edmond Plutniak, en la foto) informis pli ol mil instruistojn pri la lingvo.



• **Numismatiko:** Granda usona semajnavuo por monerkolektantoj, *Coin World* (Monermondo), dediĉis 4 duonajn paĝojn al Esperantaj temoj en sia numero de la 1-a de novembro 1989. La artikolojn verkis teknika redaktoro Michele Orzano, kiu montras bonan informitecon, citante plurajn anglalingvajn fontojn. Ekzemplero kosta US\$1,25 plus sendokostojn, de *Coin World*, PO Box 150, Sidney, OH 45367, Usono.

• **Paco:** Hungara Packonsilio aperigis sian sendependan politikan programon ankaŭ en Esperanto: petu ekzempleron de ĝi ĉe Pf. 440, H-1395 Budapest 62. Esperantistoj Imre Péthes kaj Sándor Jakab estis elektitaj en la Konsilion okaze de ĝia julia konferenco.

• **Planlingvoj:** Dum novembro la Norvega Radio dissendis kvar unuhorajn programojn pri "artlingvoj", kiujn pretigis reĝisoro Tron Øgrim. La ampleksa buĝeto por la serio ebligis dungi profesiajn aktorojn, entrepreni seriozajn esplorojn kaj vaste reklami la serion tra la lando. La tria programo estis dediĉita al Esperanto.

• **Popolmuziko:** De la 22-a ĝis la 24-a de julio okazis sepafoje la tradicia renkontiĝo de popolaj orkestroj en la Etnologia Muzeo de Toruń, Pollando. Partoprenis i.a. orientgermana, bulgara, jugoslava, hungara kaj ĉeĥoslovaka grupoj, inter kiuj Esperanto funkciis kiel la ĉefa interkomprenilo.

EKOLOGIO KAJ EKONOMIKO

estos la ĉeftemo de la

3-a Internacia Ekonomikista Simpozio

aranĝota de la Ekonomikista Grupo de Hungara Esperanto-Asocio en Budapeŝto de la 26-a ĝis la 28-a de januaro 1990. La Simpozio ligiĝos al la samtempa internacia konferenco pri "Trafiko kaj medioprotekto" EKOTRANS, kie Esperanto estos unu el la laborlingvoj (apud la hungara kaj angla). La kondiĉoj de partopreno estas la samaj kiel por la konferenco EKOTRANS.

Pliajn informojn petu ĉe:

Fondaĵo Talento

Budaörs, Pf. 50, Hungario, H-2041

Telefono: (36 1) 182-3225

• **Tradukado:** En numero 35/1 de *Babel*, internacia revuo por tradukistoj, aperis anglalingva artikolo de W. A. Verloren van Themaat pri "Esperanto-literaturo kaj ĝia akcepto ekster la Esperanto-movado".

ESPERANTLINGVAJ RADIO-ELSENDOJ DUM LA JARO 1989

			Nombro	Daŭro
<i>Aŭstrio</i>	Wien	25 min/sem	104	43.20
<i>Brazilo</i>	Rio de Janeiro	15 min/sem	52	13.
	Sorocaba	60 min/sem	52	52.
<i>Ĉinio</i>	Beijing (30x4=)	120 min/tage	1460	730.
<i>Hungario</i>	Budapest	10 min/sem	52	8.40
<i>Italio</i>	Roma	20 min/sem	52	17.20
<i>Jugoslavio</i>	Zagreb	15 min/sem	52	13.
<i>Kubo</i>	La Habana (20x4=)	80 min/sem (ĝis jul.)	120	40.
	(30x3+20x2=)	130 min/sem (de aŭg.)	110	47.40
<i>Pollando</i>	Warszawa (25x4+30x2=)	160 min/tage	2190	973.20
<i>Sovetunio</i>	Tallinn (10x2=)	20 min/mon	48	8.
	Vilnius (4x2=)	8 min/sem (de apr.)	78	5.10
<i>Svislando</i>	Bern (10x19=)	190 min/sem	988	164.40
<i>Vatikano</i>	Vaticano (10+15=)	25 min/sem	104	21.40

Entute por la jaro 1989: **5462** elsendoj per **13** stacioj dum **2138** horoj.

• **Radio:** Ekde decembro 1989 la hispanlingva fakrevuo *CQ: La revista del radioaficionado* (Revuo de la radioamatoro) aperigos regulan rubrikon en Esperanto. Petu informojn ĉe la redakcio: Gran Via de les Corts Catalanes 594, E-08007 Barcelona, Hispanio. En la rubriko kunlaboras José Dávila Dorta, Pk. 39, E-38080 La Laguna, Tenerifo, kies tutpaĝa artikolo pri Esperanto aperis en la novembra numero.

Oficiala Informilo

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): Kanado: Wally G. du Temple. Kanarioj: Kristina Krause de Goralski; Larga Adomski. Usono: Gigi Harabagiu. **SUBTENANTOJ** (minimumo \$25): Finnlando: Terttu Österman. Kanado: Edward William Woodruff. Usono: Gigi Harabagiu; Doris C. Haim; Joan Philips; Lucille C. Harmon; Solomon D. Helfgot. **AMIKOJ** (minimumo \$10): Finnlando: Aappo Kurikka; Anna Selonen. Kanado: Alma More. Norvegio: Elna Matland. Usono: Gigi Harabagiu; Karlo Donoghue. **KLUBO 777** (minimumo \$777): Usono: Eugene H. Thompson Jr.; Gigi Harabagiu; Humphrey Tonkin; Janet Holden-Adams; Rochelle F. Grossman.

PATRONOJ DE TEJO 1989

FR Germanio: Günther Becker. Francio: Barbara Despiney; Jeanne-Marie Cash; Claude Dugrain; Clarisse Mounier; Denis Flochon; Emmanuel Chicot; Thierry Fevrier; Henri Boyet; Irène Bican; Michel Gaillard; Raymond Despujols; Frato René-Jean Marmou; Sylvaine Le Magadure; Thierry Lambert. Italio: Ada Fighiera-Sikorska; Clara Gubbioli Carioli; Giuseppe Di Donfrancesco. Japanio: Kazuko Kikusima (Krizantemo); Yosiki Tatum. Norvegio: Margrete Landmark. Usono: Gigi Harabagiu.

SOCIETO ZAMENHOF 1989

Belgio: Jules Verstraeten. Brazilo: Marija Pozder Almada; Ant. de Souza Barbosa. Britio: d-ro John C. Wells. Finnlando: Harri Tuomola; Terttu Österman; Vuokko Tellervo Heinäsuo. FR Germanio: Christel Siffirin. Hispanio: Josep Castellort i Riba; José Franquesa Solé. Italio: Clara Gubbioli Carioli.

Kanado: Dorothy M. Hawley. Nederlando: A. M. E. van Walsem-Schutte; M. van Bentum-v.d.Broek; Jenneke Dunnewold-Ehrmann; Ru H. Bossong; W. C. Keizer; Willy Keizer-Rosenkrantz. Norvegio: Tamiko Kaŭakami-Nielsen; Margrete Landmark; Maj Vidar Vik. Svedio: Birger Vigen; Eugen Rytenberg; Gunnar Gällmö; Lennart Svensson; Nils Olsson; Sven Sundin; Tomas Jansson. Usono: Victor Arnold; Gigi Harabagiu.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Jugoslavio: D-ro Mika Andrić.

DONACOJ 1989 (gld.)

ĝis la 26-a de oktobro

FONDAĴO AFRIKO: Nederlando: J. C. v. Veenendaal 22,68. Sumo ĉi-jara 18 237,34.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Francio: T. Nowak 50,00. Svedio: Evald Lind 50,00. Sumo ĉi-jara 1120,00.

ĜENERALA KASO: Anonime: 3750,00; 10,00. Nederlando: A. J. Korfage-de Jong 30,00; P. de Blaeij 12,90. Svedio: E. Lundvall 32,85. Diversaj malgrandaj 3,18. Sumo ĉi-jara 14128,20.

FONDAĴO TEJO: Nederlando: J. Heetkamp-Sensius 43,00. Sumo ĉi-jara 179,05.

ESPERANTO-CENTRO BIAŁYSTOK: Svedio: E. Nilsson 129,74. Sumo ĉi-jara 977,94.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

INDEKSO 1989

Afriko 21-23, 112, 147-148, 166
 Aguila, A. 132-133
 Akademio de Esperanto 55, 139, 155, 196
 Akademio Internacia de la Sciencoj 27, 48, 125, 199
 Rusa sesio de 187
 Albault, A. 55, 99
 Alfabetigo (Int. Jaro de) 181-182, 204-205
 Alkoholismo 199
 Alpoj-Adrio 57-58, 78, 137
 Ameriko, Suda 46-47
 Amerio, A. 90-91
 Argentino 138
 ASE (vd ankaŭ SEU) 22, 81-83, 185, 188
 Auld, W. 70-72, 191-192
 Aŭstralio 216
 Aŭstrio 78, 216
 Azia Centro 14, 61, 163
 Azio 2-3, 31, 63-64, 84-85, 112, 124, 183-184

 Bahaismo 217
 Barcsay, Z. 76
 Behr, M. 208-209
 Belartaj Konkursoj 73, 155, 182
 Belgio 216
 Benino 166
 Benczik, V. 67
 Bertin, C. 34, 198
 Bharato (Hinda Unio) 2, 78, 85
 Bi Rong 64
 Bibliotekoj
 de Germana E-Instituto 198
 Hodler 162
 Internacia E-Muzeo Vieno 7-9, 79
 Bjalistoka E-centro vd. Centro Zamenhof
 Blanke, D. 89, 147, 211-212
 Blanke, W. 168, 209
 Boulton, M. 15, 43, 78, 135, 147
 Brent, E. 74, 168
 Britio 42-45, 78, 98
 Brazilo 16, 38, 138, 216
 Budhismo 97
 Bulgario 38, 138, 172-173, 184
 Buller, O. 12, 96, 163

 Cappa, G. 193
 Centra Oficejo de UEA 3, 15, 103, 161
 Centrafrika Respubliko 38, 198
 Centro Zamenhof 24-25, 106-107, 154, 162
 Chiti-Batelli, A. 4
 Chrdle, P. 128-129, 168, 198
 Cool, J. 192
 Corsetti, R. 16, 171
 Cseh-metodo 18

 Ĉeĥoslovakio 17
 Ĉinio 2-3, 14, 38, 64, 198, 206-207

 Dang Dinh Dam 63
 Danlando 38
 Daŝgupto, P. 17

De'Giorgi, A. 72-73, 101, 193-194
 Díaz, A. 95, 118, 154
 DLT 6, 86-88
 Dobrzyński, M. 15
 Dobrzyński, R. 161-162
 DUE 1, 199
 Durwael, I. 57, 163

 Edukado 53, 109-110, 170
 vd. ankaŭ Instruado
 Edwards, J. 44-45
 Eichholz, R. 6
 Eichhorn, H. 33-34
 Ekologio 15, 17, 53, 79, 139, 148, 217, 218
 Ekonomiko 98, 139, 218
 Eksteraj rilatoj 4-5, 12, 56, 62, 108, 142, 168
 Eldonado 15, 61, 69, 104, 201
 Erasmus, H. 4, 57, 126
 Estonio 98, 185-186
 Estraro 61-62, 150, 161-163
 Estrara raporto 103-117
 Eŭropo
 Eŭropa agado 4-5, 126-127, 155, 210, 216
 Eŭropa junularo 90-91
 EXPO '92 217

 Familioj 16, 171
 Farani, S.A. 79
 Fervojo 39, 79, 128-129, 168, 217
 Fettes, C. 26-27
 Fettes, M. 5-6, 21-22, 61-62, 126-127, 150-151, 161-162, 172-173, 178-179, 204
 Filatelo 139
 Filipinio 216
 Financoj de UEA 61, 104, 114-117, 161-162
 Finnlando 16, 18, 79, 98
 Fjodorov, A. 190-191
 Foliume 18, 97, 198
 Fondaĵo Carson 53
 Fondaĵo Grabowski 101-102
 Ford, C. 82-83
 Fotoarto 139
 Francio 38, 78, 138
 FR Germanio 199

 Gacond, C. 121-123
 Germana DR 199, 217
 Goldman, T.A. 29-30
 Gregor, D.B. 74, 176
 Greklando 17
 Güntel, C. J. 213-214
 Gunther, W. 15
 Gutiérrez, M. 133

 Ĝuĝev, S. 176

 Handikapitoj 91
 Hinda Unio vd. Bharato
 Hispanio 12, 16, 199
 Historio 9-11, 121-123, 184
 Hodler, H. 9-11

Homaj rajtoj 39, 98, 199
 Honoraj membroj de UEA 176
 Hungario 38, 83, 138
 ILEI vd Instruado
 Infanoj 27-27, 170, 171
 Informado 18, 29-31, 57, 62, 90, 107-108, 112-113, 124-125, 164-165, 199
 Instruado 18, 23, 98, 130, 147, 167, 199, 217
 Interlingvistiko 113, 139, 204-205, 211-213, 218
 vd. ankaŭ Lingvoj, Terminologio
 Interland 88
 Io Chou 200
 Irano 15
 Irlando 16, 41-43, 78, 138
 Israelo 31
 Italio 16, 78, 138

 Japanio 78, 217
 Jones, R.K. 91
 Jong, R. de 75
 Jugoslavio 38, 138, 169, 217
 Junularo 12-13, 57-58, 64, 82, 90, 110-111, 158-159, 184

 Kalendaro 13, 49-51, 140, 177
 Kamaĉo, G. 192-193
 Kamerunio 166
 Kanado 138
 Kanariaj Insuloj 78
 Katalunio 12, 217 vd. ankaŭ Hispanio
 Kavka, J. 55
 Komerco 6, 88
 Komisiitoj 91, 103, 161, 171
 Komitato 46, 103, 150-151
 Komputiloj 6, 34, 57, 86-88, 98, 103, 137, 154
 Kongresoj k.s. (internaciaj)
 41-a IFEF-Kongreso 128
 23-a ILEI-Konferenco 167
 24-a Infana Kongreseto 26
 25-a Infana Kongreseto 27, 170-171
 45-a Internacia Junulara Kongreso 158-159
 3-a Konferenco de Balkanlandaj E-istoj 169
 22-a Konsultiĝo de la soclandaj E-asocioj 81-82
 62-a SAT-Kongreso 166-167
 74-a Universala Kongreso 19, 41-43, 52, 141-157
 75-a Universala Kongreso 46-47, 133, 175, 203
 Koreio (Suda) 38, 78, 83, 138
 Koresponda Servo Mondskala 16, 91
 Koszmaluk, J. 12-13, 158, 163
 Krause, E.-D. 134-135
 Kubo 46-47, 132-133, 138
 Kulturo 17, 67, 70-73, 84-85, 101, 108-109, 184, 190-191, 203
 Künzli, A. 185-186
 Kuznecov, S. 187-188, 204-205, 211

 Laaksonen, J. 47
 Landa agado vd. laŭ lando aŭ regiono
 Lapenna, I. 18
 Laste aperis 18, 35, 76-77, 97, 118-119, 136, 148-149, 174, 195, 215
 Libroj
 Akademiaj studoj 1987 213-214
 Amo, amor, adoro 193
 Antaŭ la nova jarmilo 32
 Aŭstralia antologio 95
 Beletro, sed ne el katedro 74
 Bestoj kaj homoj 193

- Bibliografio de disertacioj pri E-o* 211-212
Desislava ridetas 194
Dum vi estis kun ni 192-193
En barko senpilota 70-72
En la mirinda mondo de la kino 33
Enlumiĝo 194
En novan mondon 75
Esperanta bildvortaro 134-135
Esperanta rimvortaro 214
Fenomeno Esperanto, La 32-33
La fratoj Leonkoro 134
Infoduktoj 34
Interlinguistics 212
Jubileo 191-192
Karuseloj... 75
Kiel Esperanto venkis? 212-213
Konfliktoj inter esperantistoj 212-213
Laborista E-movado en Hungario, La 1913-1934 213
Laŭdo de l' Stulteco 96
Lingvo kaj vivo 211
La malgranda Johano
Mistera lumo 193
La nigra insulo 135
La nova paradigmo en psikologio 33-34
Patrina koro 193
Sanga nupto kaj La domo de Bernardo Alba 95
Sur la vojoj de la Analiza Skolo 214
Studoj pri la internacia lingvo 74
Terminologia kurso 89
Terra 192
Tri 'stas tro 194
Vagante tra la mondo maltrankvila 193-194
- Lingvoj**
 en Britio kaj Irlando 41-43
 en Eŭropo 126-127, 210
 en internacia komunikado 98, 145-146
 Esperanto 54-55, 119, 131-132, 197
 Jazu 99
 Lingvistoj 90
- Lins, U. 11, 79, 163, 189
 Lock, N. 55, 152
 Long, K. 44-45
 Lozgačev, N. 194
 Luin, U. 184
- Mac Aoidh (Mackay), G. 42-43
 McCoy, R. 200
 MacGill, S. 130, 156
 Madagaskaro 17
 Maertens, G. 163
 Major, J. 96, 200
 Malajzio 124
 Malinowski, R. 99, 162
 Matthias, U. 57
 Mayer, H. 7-9
 Medicino 39, 139
 Masaĝo 199
 Mediteraneo 138
 Medvedev, L. 28, 148
 Meier, A. 39
 Melnikov, V. 214
 Membraro de UEA 59, 161-162, 178-179, 199
 Menabene, A. 4-5, 126
 Mihalkov, G. 200
 Milojević, S. 3, 46-47, 81-82, 94, 162, 201-202
 Miyamoto M. 189, 213
 Moerbeek, R. 3
 Mullarney, M. 53, 90
 Muziko 18, 139, 148-149, 152-153, 199
- Guadarrama, M. k A. 46-47
 Kajto 152
 Popola 218
 Team' 84-85, 152
- Naeem J. 84, 200
 Nagata A. 93
 Nagy, I. 4
 Neave, A. 53
 Nederlando 78
 Nekrologoj 36, 100, 140, 189, 197-198
 Nepalo 2, 124
 Nervi, M. 70-72
 Nordio 47
 Numismatiko 217
- O'Cuir, L. 127
 Oficiala Informilo 40, 60, 80, 100, 178, 218
 Onet, I. 137, 216
 Oomoto 2-3
- Pabst, B. 135
 Paco 79, 148, 217
 Pakistano 38, 84-85
 Pentarto 79
 Pérez de Cuellar, J. 17
 Polgár, familio 17, 170
 Politiko 210
 Komunisma 17, 79, 82
 Radikala 4, 39, 126
 Verdula 126
 Pollando 17, 125
 Portugalio 38
 Princz, O. 163
 Privat, E. 121-123, 168
 Prytz, O. 131-132
- Radio 3, 20, 79, 154, 180, 200, 218
 Rados, P. 170
 Ragnarsson, B. 73
 Rašić, N. 156-157, 162
 Reagoj 14-16, 37, 72-73, 118-119, 137, 196-197, 190-191, 216
 Recenzoj 32-34, 74-76, 95-96, 89, 134-135, 191-194, 211-214
 Regiona agado vd. Afriko, Ameriko, Azio, Eŭropo, Nordio
 Régulo, J. 32-33, 201-202
 Reinders, N. 3
 Religia agado 139, 154
 Katolikismo 39
 Legio de Bona Volo 16, 139
 Revuoj 65-67, 186-187, 198, 203
 Avanco 198
 Brazila esperantisto 198
 ENA informilo 97
 Esperanto 92-94
 La kancerkliniko 198
 Kontakto 12, 15
 Language International 97
 Monato 18
 Moskvaj novaĵoj 6, 186
 Scienca bukedo 198
 Survoje 198
 TEJO-tutmonde 12
 Ritterspach, G. 128-129
 Rossetti, R. 79
- Saheb-Zamani, Ĵ. 15
 Sakaguchi, A. 17
 Salvesen, N. 163, 203
 Samodaj, V. 200
 Santiago, I. 200
 SAT 166
 Schad, W. 14
- Schnell, R. 26, 62, 164-165
 Schubert, K. 86-88
 Scienca aplikado 17, 79, 112-113, 139, 168, 206-207
 vd. ankaŭ AIS, Komputiloj, k.s.
 Seka, H. 168
 Semajno de Internacia Amikeco 1
 Sovetrespublikara E-Unio 22, 81-83, 185-188
 Senegalio 21-23
 Shen Chenru 206-207
 Singapuro 124
 Siurawska, E. 24-25
 Skandinavio vd. Nordio
 Skoltoj 199
 So G. 163
 Sosniecki, J. 212
 Sovetunio 28, 78, 81-82, 185-188
 vd. ankaŭ ASE, SEU kaj laŭrespublike
 Stahlberg, S. 14
 Støp-Bowitz, C. 79
 Strategio de UEA 1, 14-16, 25-26, 29-31, 57, 210
 vd. ankaŭ Estraro, Komitato, Reagoj
 Svedio 138
 Svislando 38, 124-125
- Ŝako 17
 Ŝtimec, S. 163
- Tajlando 183
 Tanzanio 166
 Taŝeva, M. 130-131
 Team' vd. Muziko
 Teatro 153, 199
 TEJO vd. Junularo
 Terminologio 6, 88-89, 134-135, 168, 208-209
 Tiŝljär, Z. 57, 171
 Togolando 17, 39, 78, 166, 217
 Tonkin, H. 1, 142-144, 150-151
 Towsey, A. 54, 197
 Tradukado (vd. ankaŭ DLT) 39, 137, 218
 Tričkov, R. 99
 Turkio 98, 138
 Turismo 18, 99
 Tyblewski, T. 125
- Ukrainio 187, 199, 217
 Unuigintaj Nacioj, Unesko 79, 108, 168, 181-182, 204
 Ungar, K. 155
 Urban, M. 137
 Usakiewicz, W. 32-33
 Usono 98, 156
 Uŝpieński, J. 56-57
- Van Trong 63
 Velkov, K. 214
 Venezuelo 217
 Venture, A. 176
 Vidbendoj 200
 Virina agado 130-131
 Vjetnamio 63, 138, 183-184
- Waringhien, G. 74, 212-213
 Weindling, F. 99
 Wells, J. 145, 150, 154, 162
 Wennergren, B. 30-31, 196
 Werdin, J. 31, 84-85, 124, 163, 183-184
 Westerhoff, B. 184
 Williams, N. 176
 Wu Guojiang 63-64
- Zairio 98, 166

Preskaŭ ducent studentoj 16- ĝis 18-jaraj eklernas Esperanton en liceo. Subtenu per leteroj, donacoj por la biblioteko: Instituto Carlos Gracida, A/P 318, C.P. 68000 Oaxaca, Meksikio.

Juna amiko, la lernejana revuo, atingis sian kvindekman numeron kaj kvarmilan abonanton. Ricevu 4 numerojn jare, nur 8,40 gld. ĉe la abonservo de UEA.

Kasedoj de la Brajtona Universala Kongreso: Prelegoj – distraĵoj – solenaĵoj. Pli ol 20 altkvalitaj stereofonaj sonbendoj nun aĉeteblaj. Petu liston de

La Esperantaj Servoj de Ivor Hueting, c/o 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, Britio.

Anoncetoj

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respond-kuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

La voĉo de junaj esperantistoj en Tanzanio, *Orienta stelo*, aboneblas kontraŭ po unu irk por ĉiu numero ĉe Anita Dagmarsdotter, Mariehamnsgratan 18, S-16479 Kista, Svedio.

Renato Corsetti kaj Anna Löwenstein (eks Brennan) anoncas sian novan telefonnumeron: +39 6 95 75 713.

Kvardekjara fiŝkomercisto interesiĝas pri la ĉina pentrarto, eŭropa olepentrarto, literaturo, komerco. Li Ya Min, Xierdaojie No. 17-1, Qiqihaer, CN-161006 Ĉinio.

Claude Piron Vi ne povos diskuti pri Esperanto, se
La bona lingvo vi ne konas tiun verkon,
112 p. 14,10 gld. kiu sensacie klare montras la
superecon de la Zamenhofa lingvo.

Edmond Privat *Tra l' silento* 28 p. 7,80 gld.

Mendu ĉe UEA aŭ ĉe:
PRO ESPERANTO, Postfach 28, A-1014 Wien, Aŭstrio.

Jus aperis:


BIBLIOTEKA TERMINARO

kun angla, ĉina, franca, germana, kaj hispana indeksoj
de Doug Portmann (Usono) kun S-ro Koralo (Ĉinio)
Konsultlibro kaj E-lingva terminaro por bibliotekistoj, eldonistoj,
informsciencistoj, aŭtoroj, presistoj, kaj la humila libro-amiko.
1989, 239 p. bind., 19 cm. Mendu ĉe la Libro servo de UEA: 27,00 gld.

Esperanto-Societo (Malto) invitas vin partopreni en la
Tria Internacia Turisma Semajno en Malto
de la 24-a ĝis la 30-a de aŭgusto 1990

Prospektoj kaj aliĝiloj haveblaj ĉe:
Esperanto-Societo (Malta),
P.O. Box 142, Valletta, MALTA.

INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE UEA/ILEI



Venontaj eblecoj ekzameniĝi je elementa aŭ meza nivelo estas en Kultura Centro Esperantista (Svisio), 3-4 jan. fine de la jarŝanĝa skiferio, kiu inkluzivos preparajn sesiojn, 10-20 apr. fine de intensiva prepara kurso, kaj en junio en la San-Franciska Ŝtata Universitato.

Sondoj pri pliaj ekzameneblecoj eĥas pri Kastelo Grésillon (10-21 apr.), Kungälv (Svedio apud Goteburgo, 11-15 junio), Pisanica (Bulgario) kaj Poprad (Slovakio).

Kiu interesiĝas, anonciĝu al KCE, pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio pri la sesioj tie; al S. MacGill, p/a HEA, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario, pri aliaj sesioj.

Pretiĝu per la 36-paĝa gvidilo: *Internaciaj ekzamenoj de UEA-ILEI*, kiu prezentas i.a. specimenajn testojn. Prezo ĉe UEA: 6,60 gld., ĉe FEL 120 BEF, ĉe EAB £1,80, ĉe KCE 5 SFR, ĉe IEF 4500 liroj, ĉe HEA 50 forintoj.

LIBROTEKO TOKIO

anoncas la reaperon de eterna verko
pri amo kaj tragedio:

Kvin virinoj de amoro

de Ihara Saikaku


SERIO ORIENTO-OKCIDENTO N-RO 7

eljapanigis Miyamoto Masao

“La aŭtoro... lerte plektas la fadenojn de la okazaĵoj kaj dum la objektiva rakontado jen kaj jen per ŝercaj eldiroj palpebrumas al la leganto, kvazaŭ por plifaciligi la pasie preman atmosferon. Ni havas per lia rakontado plenan impreson pri loko kaj tempe malproksima, ne tre dezirinda, sed tre interesa mondo.... [La libro] mem estas plezure studebla kvazaŭ miniatura enciklopedieto de la japana vivo.”

—LAJOS TÁRKONY

Dua eldono 1989. 160p. Bindita. Ilustrita.
Mendo de la Libro servo de UEA: 31,80 gld.



Bonvenon al la Kvintopinta Semajno

23-29.7.1990

en Naantali/Nådendal, Finnlando, Nordio!

Temo: Nordio. Kunlabore organizata de junaj nordiaj Esperantistoj. Altkvalita tema kaj distra programo. Internacia Esperantokurso por komencantoj. Plej favoraj kotizoj por aliĝantoj antaŭ februaro. Aliĝilon kaj pliajn informojn pri la KpS petu de: Riitta Pulli, Kulkustie 3 B 14, SF-36240 KANGASALA, Finnlando, tel. +358-31-640 668.



Jen ĝi estas – la longe atendita libro:

MEMORLIBRO

GRAZ 1987

LA INTERNACIA JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO CENT JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO

Ampleksa raporto pri la plej grava kultura evento en 1987, enhavanta:

1. la lastajn paroladojn de Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj de D-ro Paul Neergaard;
2. superrigardon de la 100-jaraj kulturaj atingoj. Lekciistoj: Albault, Régulo Pérez, Gacond, Marjorie Boulton, Ragnarsson, Neergaard, de Zilah, Mayer, Thierry, Zelazny, Lapenna;
3. rezoluciojn, fotoreportaĵon ktp.

Eldonita de "FONDAĴO IVO LAPENNA", redaktita de D-ro Klaus Perko, Aŭstrio.

Formato A5, broŝurita, 170-paĝa, verdkolora, glita kovrilo. Prezo: 175 d.kr. inkl. afranko.

Mendu ĝin ĉe la Libroservo de UEA (50,70 gld.) aŭ rekte ĉe "FONDAĴO IVO LAPENNA",

kasisto: Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio, pĉk.: København 1190601.

Nobelpremio pri literaturo 1989:

Camilo José Cela

La familio de Pascual Duarte

el la hispana tradukis Fernando de Diego

Ĝuu en Esperanto unu el la ĉefverkoj de la moderna mondliteraturo: aŭdacan kaj krudan bildigon de la primitiva kampara socio, en 1942 frapintan Hispanion kiel fulmo el nigra ĉielo. La intensa penetremo kaj homkompreno de la aŭtoro vekis vastan admiron.

Eldonis Barcelona Esperanto-Centro, 1985. 166p.
Ilustris Joan Carles Magria. UEA-prezo: 18,00 gld.



Por sensoifigi ĉiun literaturamanton:

poemoj

rakontoj

eseoj

antikvaj kaj novaj,
originalaj kaj tradukitaj,
simplaj kaj profundaj.

**Tra 10 jaroj Fonto akvumas
nian beletran kampon.**

Ĉerpu vi el ĝi!

Abonu pere de UEA (30 gld.)
aŭ rekte ĉe la eldonisto (US\$15):

Gersi Alfredo Bays

Caixa Postal 49, BR-89800 Chapecó-SC, Brazilo



eldonejo ludovikito

post la iel-tiela kompletigo

ĉerpu kun profito el unika kolekto:

Unuaj libroj por esperantistoj (2-a eld.) - 39,00

La inkunabloj de Esperanto - 39,00

Ni laboru kaj esperu! (1887-1891) - 39,00

Antaŭen al la laboro! (1892-1895) - 39,00

Tamen la afero progresas! (1896-1900) - 39,00

Hebreo el la geto - 48,00

Kun gradaj paŝoj eksterlanden! (1901-1904) - 39,00

Klopodis organizi, sed vane! (1905-1906) - 39,00

La neforgeseblaj kongresoj - 48,00

Por kaj kontraŭ reformoj! (1907-1908) - 39,00

Mortinta, sed senmorta! (1909-1917) - 39,00

Postrikolto de ludovikaĵoj - 48,00

...aŭ mendu ĉiujn 12 titolojn unufoje kiel:

plena verkaro de l.l.zamenhof

Plej laste aperis: ...tri kompletigoj pri
la tumultaj jaroj antaŭ kaj post la Ido-krizo:

La franca periodo de Esperanto (1901-1905) - 48,00

Kiel Esperanto venkis? (1907-1908) - 48,00

Konfliktoj inter esperantistoj (1909-1911) - 48,00

...kaj la tuta Zamenhofa tradukaro, inkluzive de
la kompleta tajposkripto de la Malnova Testamento!

Mendu aŭ petu pliajn detalojn de la Libroservo de UEA.

Maire Mullarney:

ESPERANTO FOR HOPE

Eld. Poolbeg, 1989. 192p. 21cm.

Ĉu inter viaj geamikoj estas tiuj, kiuj bone scias ke la angla estas la mondlingvo? Per tiu scio kaptu ilin. Donacu al ili rakonton en la angla pri la spertoj de lastatempa lernintino (nun komitatano), kiu ruze transdonas ne nur informojn sed pli kaj pli da Esperanto mem. La unuaj 200 restantaj ekzempleroj de *Esperanto for Hope*, menditaj rekte ĉe la verkisto, Maire Mullarney, The Mill House, Rathfarnham, Dublin 14, Irlando, vendiĝos je rabato: IEP 5,00 (per Eŭroĉeko) aŭ 15 gld. Eblas ankaŭ mendi de la Libroservo de UEA (22,50 gld.).